En autocar Grand tourisme, départ vers Stockholm par Jönköping et Gränna avec arrêts tourisme. Visite de Stockholm (Hôtel de ville, vieille ville, Palais royal,...), excursion en bateau vers le Château de Drottningholm. Visite d'un bateau d'il y a 3 siècles unique et restauré, puis d'un musée de plein air d'arts populaires. Route avec croisière vers le sud de la Suède, puis vers la ville hanséatique de Kalmar. Excursion à l'île de Öland. Traversée du "jardin de la Suède", puis arrêt près de la rivière des rois, jusqu'à Malmö. Traversée vers le Danemark. Visite panoramique de Copenhague. Retour en ferry vers Göteborg, d'où notre retour à Paris. Il est prévu un après-midi libre à Stockholm.

Nous ne pouvons organiser cet ensemble que si nous avons une vingtaine de réservations avant le 3 janvier 2003.

AIR FRANCE est très difficile pour la période concernée. Pour infos complémentaires et annonce de réservation, merci d'écrire ou d'appeler le siège (Luiza Marin: 01 42 786 886, de préférence du mardi au jeudi matin).

NB : Les prix ci-dessus pourront être réduits d'environ 15 % si nous sommes une trentaine.



35a Internacia Infana Kongreseto (IIK)

LERUM Svedio 26 julio - 2 aŭgusto 2003

Esperantujo atendas infanojn en la nordo!



La venontjara Infana Kongreseto okazos en apudlaga feria centro *Knappekulla*, en la komunumo *Lerum*, 18 kilometrojn oriente de *Gotenburgo*.

Loĝigo okazos en seso da lignaj dometoj, en ĉambroj kun inter 1 kaj 8 litoj. Aparta domo provizas manĝosalonon kaj kunvenejon. Ĉiuj domoj estas apudaj, kaj situas nur cent metrojn for de la lago *Lilla Starnsjöm* (eta balbut-lago), kie eblas naĝi. La lago havas sablan fundon kaj puregan akvon.

Apude estas arbaro, kie eblas trovi kaj pluki bongustajn mirtelojn kaj diversajn fungojn (kantarelojn). Ne tro for estas farmbieno kun ĉevaloj. Estas ekstere tabloj, benkoj, kradrostejo kaj sporta tereno. Ĝi estas trankvila loko, sed ne tute izolita. La loĝigo estos konvena sed modesta. Infanoj devos kunporti proprajn lit-tukojn kaj ban-tukojn. Ekskursplanoj estas en preparo.

Inter eblaj programeroj estas manlaboroj, muzikado, kukbakado, paperfaldado, kvizoj kaj skeĉumado, dum ekstere estos sportoj, promenoj kaj akvo-ludoj.

Estos konvenaj gvidantoj (ni celas unu por ĉiu kvino da infanoj, almenaŭ unu sveda lokulo). En la kuirado eblos atenti la dietajn bezonojn/dezirojn de infanoj.

Jen la kotizoj en eŭroj (€): A- kaj B-landoj laŭ la UK-difino:

	Limoj	A-landoj	B-landoj
31-jan 2003		195	165
31 mar 2003		225	195
31 majo 2003		245	215
poste		275	245

La kotizo kovras kostojn de transporto, restado, tri manĝoj tage kaj programo de la vespero de la 26a de julio ĝis la mateno de la 2a de aŭgusto. Ĝi inkluzivas nenium asekuron, kiun la gepatroj mem devas prizorgi, liverante pruvilon pri tio.


Aliĝo ekestas definitiva kaj estos konfirmita post ricevo de minimuma antaŭpago de 149 eŭroj al la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kies alvendato determinas la plenan sumon pagendan. La cetero estos pagenda plejlaste al la kasisto de UEA komence de la Universala Kongreso.

Ni akceptas nur infanojn kiuj jam komprenas kaj parolas Esperanton, tiuj povas veni el E-familioj aŭ lernejaj klasoj. Infanoj, helpantoj kaj gvidantoj ricevas aŭtomatan kaj senpagan aliĝon al la UK. Infanoj post la unua en familio, kaj akceptitaj helpantoj, ricevos rabaton de 15%. Estas je dispono nur kvardek lokoj.

Informilo kaj aliĝilo estos dissenditaj kun *Juna Amiko 2002/4*, kaj estas peteblaj de la Centra oficejo aŭ la komisiito:

Stefan MacGill Pannonia u. 30 / I / 6, HU-1136 Budapest

Tel. (+36 1) 349-5207 stefan.macgill@galamb.net



E K ! Al la lupco !

pri la mondo, la lando, la regiono, ...

Esperanto 40. 000. 000-oble (kvardek milionoj) en la reto!!!

Kiom da Esperantistoj ekzistas en la mondo? Centmil respondis al mi pesimistoj, unu miliono iom malpli pesimismaj, ses millionojn ni taksis laŭ kalkuloj optimismaj, dudek milionojn mi foje legis en publikaĵo de Unesko. Ĉu eble ili ĉiuj estas pesimistoj. Sur la serĉilo *Fireball* <http://suche.fireball.de/cgi/querjav1.fcgi?action=query&pg=express&q=esperanto&what=web> mi trovis hodiaŭ ja, je la 11-a horo, 40 195 479 (kvardek milionoj centnaŭdekkvinmil-kvarcentsepdeknaŭ) da mencioj pri la serĉovorto „*Esperanto*“! . . .

Kompare pri la serĉovorto „*English*“ la maŝino (<http://suche.fireball.de/cgi/querjav1.fcgi?action=query&pg=express&q=English&what=web>) trovis „nur“ 35 milionojn da mencioj! Fakte mi, nur kun la serĉovorto „*God*“ (angle por Dio), povis trovi pli da mencioj, nome 53 milionojn. Tio signifas, ke Esperanto estas unu el la plej ofte menciitaj vortoj en la tuttera teksaĵo. Cetere por vidi la evoluon: antaŭ unu jaro sama serĉado donis unu milionon da trafoj...



Tio montras, ke Esperanto ne estas malkreskanta afero preskaŭ mortanta sed pli aktuala ol iam iajn!

Plezuran legadon, *Dietrich M. Weidmann, ĉefredaktisto (2002-09-04)*

... Ni plue "frandu Piron!"... aŭ
parolo de saĝulo...

Claude PIRON skribis bonegan reagleteron***, kies kerna frazo, laŭ mi, estas la jena:

"Nobody knows if it will be the universal language of the future, but I do now that it is a very easy, funny and expressive language of today, a language that respects all cultures much more than English..."

... kaj en E-o:


"Neniu scias, ĉu ĝi estos la universala lingvo de la estonteco, sed mi scias, ke ĝi estas tre facila, amuza kaj esprimriĉa lingvo de la nuntempo, lingvo, kiu respektas ĉiujn kulturojn multe pli bone ol la angla..."

D Gary Grady
Durham NC USA
dgary@mindspring.com



*** La artikolo aperis en la anglalingva tagĵurnalo *Waikato Times*... La mesaĝo legeblas en la arkivo de <http://groups.yahoo.com/group/reago> sub la temo ("subject") "Waikato Times".

(Parenteze, kvankam la angla "fun" pli-malpli egalas "amuza", "funny" signifas ne "amuza" sed "komika". Tio bone montras kiel tiu lingvo povas trompi eĉ tre spertan sed ne denaskan parolanton de la angla. Sed nek mi, kompreneble nek Raymond Schwartz disputus, ke E-o ja povas esti amuza kaj komika.)



NI RAPORTAS

Majo 2002	Raporto pri la perkoresponda kurso (PKK) servo de Esperanto-France-Est far la responsulo Robert KUENY	
1^e Periodo	Jaro inter la ĝenerala asembleo de France-Est en majo 2001 en Epinal kaj tiu de 2002 en Nancy	
2^e Varbado	Reklamado por la PKK far la ses responsuloj de la ses departamentoj de France-Est (laŭ nova organizado de PKK en 2000)	
	En 1 departemento reklamo ĉe lokaj ĵurnaloj dufoje jare, en alia unu foje jare. Plej kutime la responsuloj aludas la PKK-on dum renkontiĝoj, budoj, individuaj kontaktoj, artikoloj pri Esperanto-eventoj, prefereble al ĵurnalaj reklamoj	
	De la sidejo de la responsulo de PKK, sendo de 7 prospektoj laŭ peto.	
3^e Rezulto, Enskribiĝo, Aliĝo al PKK	10 novaj aliĝoj <ul style="list-style-type: none"> • 8 por metodo 11 • 1 por metodo 12 • 1 por tria-grada kurso (Paŝoj al plena posedo de W. Auld) 	Tiuj 10 venas de <ul style="list-style-type: none"> • 4 el la Inter-reto, • 1 post IJK en Strasburgo, • 2 de amikaj kontaktoj, • 1 per la INFORMILO, • 2 "ne konataj".
	4^e Instruado	Estas 4 gvidantoj por tiuj 10 novaj aliĝantoj kaj por 3 malnovaj lernantoj (antaŭ 2001)
5^e Konkreta laboro de la lernantoj	De tiuj 13 gelernantoj	<ul style="list-style-type: none"> ▪ 5 neniam sendis ian taskon ▪ 2 haltis post la tria leciono ▪ 6 bone laboras sufiĉe regule

... LASTAJ EĤOJ EL BRAZILAJ KONGRESOJ ...

IKEF *** en la Universala Kongreso de Fortaleza

En informkunveno okazinta la 5-an de aŭgusto, la prezidanto Franz BRAUN salutis la 25 partoprenantojn, inter kiuj 13 membroj. Li raportis pri la celo kaj taskoj de IKEF. Multe diskutata estis la instigo kaj subteno de la komerco per Esperanto inter E-komercistoj, nuntempe helpata de pluraj retpaĝaroj kaj retlisto per-esperanto-komerco@yahoo.com. Laŭdon ricevis la estraro pro esperantigita eldono de normaj reguloj de ICC (**International Chamber of Commerce, Parizo**) k.a. En jaŭdo 14-kapa grupo vizitis SEBRAE-instituton por disvolvigo de la ekonomio en ŝtato Ceará. Ĉiujare dum la UK-semajno, IKEF vizitas tiajn entreprenojn aŭ institutojn, por a) mem informiĝi pri la stato de la ekonomio kaj eblaj problemoj kaj b) demonstri, ke Esperanto ankaŭ taŭgas por komerco/ekonomio.

Franz Josef BRAUN, Germanio (KN 312)

*** Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

INTERNACIA JUNULARA KONGRESO... MALGRANDA SED SUKCESA



Ĉirkaŭ 100 gejunuloj partoprenis la ĉi-someran **Internacian Junularan Kongreson (IJK)** en *Pato Branco* (Brazilo), de la 21a gis la 28a de julio, kaj ĝuis la prezentaĵojn de la loka teatra grupo, de rapisto *Antonio Morera* kaj de *DJ Roger*, vizitis la akvofalon de *Iguacu*, ktp. La kongreso utilis ankaŭ por interŝanĝi spertojn pri la amerika movado kaj kontakti lokajn gravulojn kaj amaskomunikilojn.



Informis Holger Boos

... kiam komitatanoj feriflugas foren ...

Al Ĉinio

stranga spektaklo ĉu ne?... jen bildo por certagrade "salivigi vin"... pri kio temas?...
solvo sine de la sekvontaj linioj !



Raporti koncize sed trafe pri trisemajna vojaĝo tra tiom giganta lando ŝajnas unuavidpunkte tute neebla ! Nu, mi provu... Memevidente mi flankelasu la iom lacigan flugon Paris-Shangai-Pekin . por atingi... la ĉefurbon !

Ĝi fidelas je sia konata priskribo... Tie kuniĝas certagrade du aspektojn de la "lando Ĉinio"... Mizera aspekto de la tiel nomataj *hutongs* -stratetoj- kun malfermataj loĝĉambroj alŝosee, kie flegme kaj preskaŭ senmove sidas sur benketoj kelkaj "butikistoj", atendantaj ofte vane iujn preterirantojn -tre rare alilandajn turistojn-..., kaj aliflanke, en la ĉirkaŭaĵo, freŝkonstruitaj, pluretaĝaj domegoj, kiuj daŭre kreskas kiel fungoj !

Sed komenciĝas nia vagabondado !...

Aliro de la fama placo *Tienanmen*, kie, je nia surprizo, daŭre vicumas centoj da scivolemuloj dezirantaj kliniĝi antaŭ la mumio de la "granda stiristo" ! Kaj jen la legendo de la supra foto ..., se vi decidis enpartopreni nian aventuron kaj legis ĝis ĉi tie! Kion faras tiuj kaurantaj soldatoj?... Tutsimple ili skrapas restaĵojn de maĉgumo (tutcerte forĵetitajn de okcidentaj turistoj !...) gluitaj sur la vasta aleo, kiun uzos baldaŭ la partoprenontoj de la onta tutnacia Kongreso...

Ne malpli surpriziga la vizito de la *malpermesita urbo* ... Nia *Elysée-Palaco* vere magras -almenaŭ aree- fronte al tiu iama urbo de la imperiestroj... Centoj da en tiu epoko luksaj loĝejoj kun tipaj pagod-tegmentoj, larĝe malfermitaj al la hodiaŭaj turistoj ! "Tie, en tiuj ĉambroj, trafis sin regule la imperiestro kun siaj konkubinoj" klarigas nia gvidisto... Tiu rivelado medigitas kelkajn virojn de nia grupo (ankaŭ kelkajn virinojn !)...

Sed fulme forflugas la tempo. Enbusiĝo cele la *Grandan Muregon* . Neatendita pluvo ne malhelpas kelkajn gekuraĝulojn ("ni" estis...) surgrimpi la foje tre abruptan, mirige larĝan ŝtuparon. Eĉ sub la nebulo impresas la ĉirkaŭa pejzaĝo... Valoras ja tia ekskurso... Iru !

Nur eta aludo al la tradicia vespermanĝo en tipa restoracio, kun la ne malpli tradicia *lakita anasaĵo* en la menuo. Ni miras antaŭ la lerteco de la kuiristo, kiu distranĉas la beston !

Sekvantan tagon, flugo por atingi *Xi'An*... Tie ni mutos longminute antaŭ la giganta fosaĵo, sur kies fundo vertikalas 7000 soldatoj (pluas ankoraŭ centoj sub tertavolo), normalstaturaj, en *bakita argilo*. Mitrajlas la fotiloj kiel sub fulmotondro ! Nekredebla spektaklo antaŭ tiu freneza "monumento" ligita al la tombejo de la unua imperiestro de Ĉinio ! Dua motivo por vi, legantoj, viziti la landon !

La morgaŭon, frumatena aliro ĝis la *Eta pagodo de la Sovaĝa Ansero* , trankvila parko, kie trejnadas praktikantoj de la Ĝ Tai Ji Quan ĝ... Jes ! Ni enpartoprenis ! Fotoj atestas !...

Sekvu nin la sekvantan tagon, denove aviadile, al *Chongoing*, kaj buse al *Dazu*, memorinda loko de la budaismo... Fakte niaj okuloj plenlarĝiĝas antaŭ la centoj da skulptaĵoj (50 000 en la regiono !), rekte ĉizelitaj reliefo ĉe la rokurfaco, dediĉataj al la "dio"...

Kaj jen neatendita -sed tamen programita- vespera evento: enŝipiĝo sur la riverego *Yang Tsé* ! Nu, se vi iomete estas timema, petu valizportanton: ni ja piediras tre atente sur ege mallarĝa ponteto el ligno, farita el krudaj malbone arigitaj bretoj, kiuj danĝere balanciĝas sur la tumultaj fluantaj akvoj ! Okulumu nur antaŭen ! Uf ! Jen ni sur la kvaretaĝa ŝipo *l'Empereur Oriental* , por tritaga krosado. Ĉu mi diru, ke tiu surrivera aventuro meritus plenplenan paĝon de « La Informilo » ?

Sufiĉe komforta kabino, bongustaj (?! (oni al kutimiĝas cetere al la manipulado de la bastonetoj), tipaj menuoj, kaj dumtage, malkovro ambaŭflanke sur la bordoj, de eksterordinaraj pejzaĝoj. Ni plej ofte navigas inter du proksimaj, vertikalaj klifoj kaj ŝoviĝas sinsekve en la famajn interkrutejojn *Qutang*, *Wuxia* kaj *Xiling*. Jen la momento por menciigi specifan ambaŭflankan panoramon, verŝajne vidata lastfoje de la preternavigantoj. Pli kaj pli nudiĝas la riverbordoj, je la lokoj, kie ĝis nun ili estis loĝitaj... Pluajn dekmetrojn supre konstruiĝas modernaj loĝdomaroj, por akcepti pli ol unu million kaj duono da homoj, kiuj vole nevole devas migri supren ... Klarigo: venontan jaron la nivelo de la Yang-Tsé altiĝos ĝis la giganta konstruata baraĝo alviale !

... Jen la aludita, eksterordinara konstruaĵo ! Nia krozadŝipo kviete ĉirkaŭiras la konstruitan baraĝon... Ni denove mutas kaj vere iĝas pli scivolaj pri la "aĵo". Elŝipiĝo, kaj unua halto en moderna halo, kie svarmas turistoj okulumentaj al preciza, klariga maketo... Ni perfekte konscias pri la futura aspekto de la loko ! Fakte, ni komprenas, kial la Ĉinoj -sincere dirite, ne ĉiuj- povos fieri pri tia realigaĵo... Kaj nun, spiral-suprenirado de specifa duonsfero el betono, taŭge lokita tiamaniere, ke de ĝia supra platformo la vizitantoj havu la eblecon ricevi imponan panoramon de la tutaĵo... Nia gvidistino emfazas pri la partopreno de francaj inĝenieroj kaj pri la elekto de famkonata firmao, cele instaladon de tri el la antaŭvidataj eksternormaj turbinoj ! Eĉ se ni konscias, ke tiu baraĝo difektos certgrade la naturan medion, nerefuteblas, ke ĝiaj plusoj estos aprezataj grandskale kaj diversmaniere....

Nu, ni retrovas la firman grundon kaj veturas ĝis Jingshou, kiu konservis grandan parton de siaj remparoj... Famas la loka muzeo pro la mumio de la sub-prefekto Sui, en "perfekta stato"...-tute nuda korpo, kun apudaj visceroj apude apartigitaj !-... Strangaj vizitantoj, kiuj preferas foti morbidan memoraĵon anstataŭ la belegajn lakaĵojn samtempe elfositajn.....

P. DENIS

(sekvota): ... Wuhan – Nankin – Suzhou – Shanghai – Guilin – Canton – Hong Kong...



Al Rusio

MLM-oj el la tendaro



Antaŭa rimarko : MLM estas mia traduko de la angla SMS, kaj tiu mallongigo signifas Mallonga Mesaĝo. Jena raporto formiĝas el pluraj MLM-j, kiujn mi povintus skribi dum la aranĝo, se tie eblintus havi aliron al telefonreto por poŝtelefono.

De la 28.07 ĝis la 07.08.2002 mi pasigis 10 tagojn en OkSEJT-42, Okcidenta Somera Esperantista Junulara Tendaro. Kvankam tiu aranĝo al mi malpli plaĉis ol EoL-a14 en Ĉeboksari, mi tre ŝatis multajn aferojn, elinter kiuj mi priskribos la sekvajn...

La kadron. La tendaro estis tre proksime de la riverego *Vetluga*, unu horon piede de la stacidomo *Vetlujskaja*, kiu situas tri horojn de *Niŝnij Novgorod* (kiu estas 7 horojn for de *Moskvo* per la nokta trajno). Resume la vojaĝo tre longis kaj tre daŭris, sed la ejo tre belis, kiam la vetero bonis.

La vesperan programon. Kiam vespere estis io programita, tio estis tre plaĉa. Estis interalie team-ludoj, konkurso "Ek, knabinoj", KGS, "Ho, Feliĉulo !" (tiu ludo en Francio nomiĝas "Kiu deziras gajni milionojn ?"), Ivan Kupala kaj kostuma vespero, gitar-kantoj kaj -muziko ĉe ligno-fajro, konkurso de Malbell'egado...

La rusajn trinkaĵojn. Vi certe pensas pri vodko. Tute ne ! Bedaŭrinde aŭ ne, mi trinkis ege malmulte da vodko tie, nur la lastan tagon eblis drinki iom da. Ĝenerale dum manĝoj trinkeblis teo, "ĉaj", kiun mi tre ŝategas nun, kaj kafo, ĉokolado, kompoto ktp.

Konatiĝon kun pluraj konindaj homoj. Ĉiujn ilin citi ne eblus, kaj incitus la aliajn. Cetere, multe da in-citado necesus.

Novajn Esperanto-kantojn, kiujn mi tre plezure aŭdis, ekz. tiun, kiu enhavas "sonas ja ja jupi jupi ja".

La eblon ajna-momente baniĝi kaj naĝi en la tut-proksima rivero, tage aŭ nokte, kiam programo ne plaĉis aŭ simple ne estis.

La gean ŝvitbanejon. Sen drinkaĵoj ĉi-foje sed gea ! Domaĝe, mi ne povis porti okulvirojn ene. Tamen tre agrablis ŝviti, laviĝi kaj puriĝi tie.


La diligentecon de rusaj samideanoj. Plej ofte ili ne krokodilas. Onidire, nur unufoje krokodilis la ĉeforganizanto, kaj post tiam aĉiĝis la vetero.

Minusaj punktoj estas i.a. la multegaj kuloj, kiuj min atakis de la komenco ; la vetero, pro kies aĉiĝo aŭguste mi malvarmumis ; la foje iom malriĉa taga programo ; la foresto de diskoteko ; kaj aliaj ne citindaj. Sed, certe pri la du ĉefaj minusoj, ne alriproĉu la georganizintojn, ili ne kulpas ! Do, estis mia frapista raporto pri aranĝo, kiun mi tiamaniere resumus : interesa, plusa kaj minusa, varma kaj malvarma, ne okcidenteca, sed somera, Esperantista, junulara, tendara. Unuvorte : spertinda !

Aleks Kadar

5a EŬROP-UNIA ESPERANTO-KONGRESO

23—28 Aŭgusto 2002



Lâu-longe de la Garda Lago

KAJ LA SUNO SUBIRAS

Je la fino de tiu kongreso mi partoprenis al ekskurso al Gardo Lago per buso kaj ŝipo. Sur tiu lago ni vidis belegan sunsubiron, kiu estis por mi la fino de la kongreso, ĉar la postan tagon mi reiris hejmen. La suno subiris, sed ne la lumo kiun mi ricevis en tiu kongreso.

Tamen mi ne ĉiam estis tiom en pozitiva penso dum tiu nova "ekskurso en Esperantolando". Tiu kongreso estis la unua, kiun mi partoprenis. Ĝis tiu kongreso mi nur partoprenis al du semajnfinaĵoj en Alzaco kaj unu kurso-semajno en Ĉaudefono (Svisio). Malgraŭ tiuj kursoj kaj grava aŭtodidakta laboro mi estas bedaŭrinde ankoraŭ "eterna" komencanto.

La temo de la kongreso "Efektiva lingva egaleco, rajto de la Eŭropanoj" interesas min evidente, sed mi volis ĉefe veni, vidi, vivi, partopreni al esperantista kongreso. Mi volis ankaŭ partopreni en tiu kongreso ĉar ĝi estis ne tro malproksime de mia alzata hejmo.

Mi ne volas insisti pri tio, kio ne bone funkciis ĉar tiam oni devis esprimi kio bone funkciis. Mi diras simple: bilanco tute pozitiva! Certe mi ŝatis la belan urbon Verono, kaj la nordon de Italio kaj la multajn belajn pejzaĝojn kiujn mi vidis dum mia vojaĝo tra Svisio ĝis Verono. Mi ekhavis multajn novajn konatojn. Sed post la reveno el Verono mi volas nur esprimi miajn sentojn, opiniojn kaj



La urbeto Garda antaŭ la sunsubiro

pri "Ŝekspiro, Italio, Internacia lingvo". Interesege!

Francio alportis rimarkeblan kontribuojn per S-ro Claude Longue-Épée, la nova Prezidanto de la Unuiĝo Franco por Esperanto, kiu prelegis pri: "Lingva demokratio kontraŭ lingva diskriminacio", kaj S-ro Xavier Devidehem, kiu prezentis la Projekton Euroscola. La unua intervenis kun memfido de maljunulo, la dua kun la impeto de junulo.

La prelegoj estis bonaj, sed oni ne lasis sufiĉe da tempo por pridemandi la prelegantojn kaj por debati. Mi proponas, ke la organizantoj de kongreso atentu pri tio eĉ se la kelkaj demanduloj aŭ debatuloj esprimas malkonformistajn ideojn aŭ ekster la ununura penso.

Oni povus imagi, ke la partoprenoj kunvenus en grupetoj (ĉiu preleganto irus en unu grupeton) por bone prepari kaj riĉiĝi la debaton de la ronda tablo de la kongresa fino.

Bona akcepto de la komencantoj

Ni kongresas pri lingva diskriminacio. Mi povis konstati ankoraŭfoje pli, ke oni riproĉas ĝenerale al la aliaj siajn proprajn turpecojn. Oni diris al mi, ke en la movado iuj pensas, ke la komencantoj ne devus partopreni al kongresoj. Ili devus antaŭe bone lerni la lingvon!

Eble pro tio la finvenko ankoraŭ ne komenciĝis, malgraŭ pli ol cent jaroj da klopodoj, penoj, kaj fojfoje gravaj siniferoj de multaj samideanoj. Mi pensas, ke oni ne sufiĉe atentis dum niaj kunvenoj kaj renkontiĝoj pri la komencantoj kaj la izoluloj.

Mi proponas, ke ĉiu kongresa komitato nomu responsulon pri la bona akcepto, partoprenado kaj integrado de la komencantoj kaj de la izoluloj. Ni scias kiom estas malfacile trovi novajn samideanojn. Sed ni forgesas ofte, ke estas ankoraŭ pli facile perdi ilin pro manko da atento, kompreno kaj toleremo. Oni povas imagi dum kongreso diskretajn kontaktojn kaj konatigojn, eĉ specialajn lokojn, momentojn aŭ kunvenojn, kie la komencantoj kaj izoluloj povas pli facile paroli, pridemandi, interrilati kaj eĉ krokodili.

Konkludo

Finfine permesi al la plej granda nombro esprimi sin kaj la diskreta atento al la aliuloj estas la komenco de humana respekto kaj de humanismo. Tiu atento estas la afero de ĉiuj samideanoj. Se ni ankoraŭ ne scias, kio estas la interna ideo, ni povas tiel vivi ĝin. Esperanto estas ne nur lingvo sed ankaŭ etika mensostato metita praktike. Tiel ni konstruos la interkompreniĝon (Mi opinias, ke "kompreno" estis tre bela vorto) inter la homoj kaj nature aŭ pli facile ek-estos la lingva egaleco ... kaj la suno leviĝos fine por ĉiuj homoj. Tre bona kongreso, ĉu ne?

Bernard Behra

proponojn pri du aspektoj.

Prelegoj kaj debatoj

Mi ŝatis la bonegajn prelegojn. Mi substrekas aparte la du prelegojn de Profesoro Humphrey Tonkin, rektoro de la Universato de Hartford (Usono). Li faris la oficialan enkondukan prelegon kaj du tagojn poste li prelegis



LA INFORMILO intervjue prezentas portreton de la nuna prizorganto de la *perkoresponda kurso de Esperanto France-Est*, Roberto KUENY, kaj montras lian vivovoĵon ekde hazarda malkovro de la internacia lingvo al aktiva promociado.

La Informilo: *Kiel kaj kiam vi konatiĝis kun Esperanto ?*

Roberto Kueny : Delonge mi sciis, ke ekzistas iu lingvo por komuniki internacie, sed la vorton Esperanto mi ne konis, ĝis mi legis en la regiona gazeto artikolon de *sinjoro Lienhardt* el Mulhouse, kiun mi tuj kontaktis kaj kiu direktis min al *s-ro Grossmann*. Tiu- ĉi plu informis min, sed mi ne tuj reagis.

Fine, post vojaĝoj kun mia edzino al Grekio kaj al Irlando, dum kiuj mi komunikis per la angla, mia edzino deklaris hejmenveninte, ke ankaŭ ŝi dezirus komuniki kun la homoj en eksterlando. Aŭtune 1984 ni do iris al *Université Populaire* en Mulhouse. Ŝi eklernis la anglan kaj mi Esperanton kun *s-ro Grossmann*. Post tri semajnoj mia edzino rezignis pri la

kurso de la angla, kaj mi ... nun okupiĝas pri Esperanto de pli ol 18 jaroj !

L.I. *Kion alportis al vi la internacia lingvo ekde kiam vi ĝin praktikas ?*

R. K.: Kio plej imponis min, tio estis la genia sistemo, kiun kreis Zamenhof, tiu logikeco, tiu reguleco, tiu tabelo de la korelativoj. Komence mi ne emis uzi ĝin vojaĝante, mi aprecis la lernadon, kaj poste la legadon de la literaturo. Nur tiam mi komprenis, ke temas pri la plej genia solvo por komunikado kun diverslingvaj homoj tra la mondo.

Min tuj poste interesis la instruado kaj la informado pri Esperanto. Mi tre rapide ĝuis la partoprenon en universalaj kongresoj. La unua estis la UK en Varsovio okaze de la centjariĝo de Esperanto (1987), poste sekvis **Vieno, Prago, Montpellier kaj Zagrebo**. Kun tiom da homoj el la tuta mondo mi parolis ! Malgraŭe miaj kolegoj en la firmao neniel volis kompreni tion ! Mi konfesas, ke la impona firmao, kiu estis min dunginta, rilatas kun Usono kaj profesie mi do "devis" ofte uzi la uson-anglan !

L.I. *Kial vi tiel streĉe promocias Esperanton ?*

R. K.: Por mi estas tute normale, proponi tiun mirindan komunikilon al la homoj ! Tutazimute mi informas pri ĝi ! Fine mi iĝis konata en mia regiono kiel *S-ro Esperanto*. Tio ne signifas, ke ĉiuj, kiuj min konas, eklernas, sed ili konas la vorton kaj la signifon de la vorto.

L.I. *Kio instigis vin prizorgi la perkorespondan kurson ?*

R. K.: Mi ŝatas organizi kaj la loko estis vaka post la forpaso de *s-ro Colnot*. Certe ne svarmas la lernantoj ! Kelkaj tre bone lernas ! Sed malĝojigas min, ke iuj pagas, mendas la materialon, sed kelkafoje eĉ ne eklernas.

Cetere: mi ankaŭ korektas la taskojn de trideko da perkorespondaj gelernantoj el Senegalio, kiuj mirinde bone studas ! Estas plezuro instrui al ili ! Venontjare mi vizitos ilin, en novembro.

L.I. *Dum pluraj Esperanto-renkontiĝoj vi deklamis parkere fabelojn aŭ rakontojn, eĉ dum tuta horo ! Ĉu de longe vi emas deklami ?*

R. K.: En la lernejo mi estis devigata lerni poemojn kaj tio ne multe interesis min, kaj nur nun mi komprenis la belecon de poemoj aŭ prozaj tekstoj kaj mi nun ŝatas lerni parkere kaj deklami. Sciu, ke mi vere malkovris aŭtorojn kiel Victor Hugo aŭ Alphonse Daudet tra la tradukoj en Esperanto. Ankaŭ originalan esperantlingvan literaturon mi ĝuas, ekzemple la tekstojn de *Raymond Schwartz*. Sed ŝajnis al mi, ke unuhora deklamado en nia moderna rapidviva epoko eble iom tedas la homojn ! Venontan fojon mi deklamos dum malpli ol unu horo !

L.I. *Vi ja ne nur en Esperanto aktoras !*

R. K.: Ne ! Mi loĝas en eta vilaĝo meze de la vogeza montaro, ne tre for de la monto *Grand Ballon*. Certe temas pri eta vilaĝo (400 enloĝantoj), sed kun ege aktiva kultura vivo. Svarmas la asocioj kaj inter ili agadas teatra trupo, kiu ĉiujare prezentas teatraĵon en la elzasa dialekto. Temas ofte pri komedioj, sed ankaŭ pri socikritikaj surscenaĵoj verkitaj de *sinjorino Rosenblatt*, eksa instruistino loĝanta en la vilaĝo, kiu nun sukcesege surscenigas siajn verkojn. Ŝi tre bone konas siajn amatorajn aktorojn kaj skribas la rolojn laŭ la personeco kaj kapablo de la ludanta aktoro. La sukceso estas tia, ke ĉiuaŭtune ni plenigas kvarfoje la teatrejon, ĉi-jare ni eĉ kvinfoje devis ludi. Kaj la homoj venas de la tuta regiono ! Sed mi ne forgesu aldoni, ke ĉiufoje iel la vorto Esperanto estas uzata okaze de tiuj okazaĵoj, ĝi do estas aŭdata de centoj da homoj. Vidu, en ĉiu situacio eblas informi, kiam Esperanto estas natura parto de la vivo. Mi do daŭrigas la formikan laboron !

L.I. *Ni dankas vin kaj deziras al vi pluan sukcesan agadon.*



53^{ème} stage parlé d'espéranto 21
11, 12, 13 avril 2003
organisé par le club d'EPINAL
 suivi de l'Assemblée Générale de
ESPERANTO-FRANCE-EST
 Il se déroulera dans les locaux d'ÉCOLONIE
 dans le village de **HENNEZEL** dans les Vosges (France)

ÉCOLONIE est un centre de vacances international dans la campagne

Des hollandais l'ont créé et le gère (visitez leur site sur internet : www.ecolonie.org)

PROGRAMME

Vendredi 11 avril

18h: accueil des premiers arrivants
 19h : repas du soir

liste des animateurs dans le bulletin 121 (mars)
 le matériel de cours sera disponible sur place

Dimanche 13 avril

à partir de 8h : petit déjeuner
 de 9h30 à 12h : cours et conférence
 12h : repas
 14h : Assemblée générale
 de **Esperanto-France-Est**
 visite organisée pour ceux qui le souhaitent
 16h : dernière chanson !!!

Samedi 12 avril

à partir de 8h : petit déjeuner
 de 9h30 à 12h : découverte d'ÉCOLONIE
 avec visite et explications
 12h30 : repas
 de 14h à 14h30 : accueil des derniers arrivants
 14h30 : réunion générale et présentation du
 programme de stage, présentation des stagiaires
 de 15h à 18h : cours

- cours pour enfants et adolescents
- cours **A** (initiation)
- cours **B** (débutants)
- cours **C** (conversation)
- Conférence **D**

De 15h à 18h : librairie de Esperanto-France-Est
 19h : repas
 20h30 : **soirée détente** (apportez vos
 instruments de musique) → chants, scénettes

Tarifs (entre parenthèses pour enfants < 11ans)	Vendredi	Samedi	Dimanche
petit déjeuner	4 euros (2)		
repas de midi	8 euros (4)		
repas du soir	12 euros (6)		
nuitée *	17 euros (8,5)		

* il n'y a que 33 lits sur place → pour les autres pas de problème : logement dans à l'hôtel voisin pour le même tarif

Adhésion : adhérent principal = **20 eùroj**, accompagnant = 12 eùroj

16ans <...>25ans = 12 eùroj, <15ans gratuit

Abonnement à la *Informilo* : **12 euros**

22 A 31 elirejo



**53a praktika staĝo
de parolata esperanto
11an, 12an, 13an de aprilo 2003
organizata de SPINA KLUBO
sekvota de Ĝenerala Asembleo
de ESPERANTO FRANCE-EST**

Ĝi okazos ĉe **ECOLonie**
en la vilaĝo de **HENNEZ EL**, en Vogezoj (Francio)

ECOLonie estas eŭropa, kampara kaj internacia feriejo

Nederlandanoj kreis ĝin kaj nun zorgas pri ĝi (vizitu la tt-ejon: www.ecolonie.org)

PROGRAMO

Vendredon 11an de aprilo

18a : akcepto de la unuaj staĝanoj
19a : vespermanĝo

Listo de la kursgvidont(in)oj kaj de la prelegont(in)oj en la bulteno 121 (marto 2003) – Kursmaterialo surloke.

Dimanĉon 13an de aprilo

Ekde la 8a : matenmanĝo
9a30 ĝis 12a : kursoj kaj prelego
12a : tagmanĝo
14a : Jara Membro Kunveno (ĝenerala asembleo)
de **Esperanto-France-Est**
turisma aranĝo por tiuj kiuj deziras
16a : adiaŭa kanzono

Sabaton 12an de aprilo

ekde la 8a : matenmanĝo
9a30 ĝis 12a : malkovro de ECOLONIE
gvidata vizito kun klarigoj
12a30 : tagmanĝo
14a ĝis 14a30 akcepto de la lastaj staĝanoj
14a30 : ĝenerala kunveno kun prezentado de la
staĝoprogramo, landoj kaj urboj de la ĉeestantoj...
15a ĝis 18a : kursoj
- infana kaj adoleskanta kurso
- kurso A (iniciantoj)
- kurso B (komencantoj)
- kurso C (progresantoj)
- Prelego
15a ĝis 18a : libroservo de Esperanto-France-Est
19a : vespermanĝo
20a30 : distra vespero (kunportu viajn muzikilojn)
- kanzonoj
- teatraĵetoj...

Prezoj (interkrampoj por infano < 11j)	Vendredo	Sabato	Dimanĉo
matenmanĝo 4 eŭroj (2)			
tagmanĝo 8 eŭroj (4)			
Vespermanĝo 12 eŭroj (6)			
tranokto * 17 eŭroj (8,5)			

* estas nur 33 litoj surloke → la aliaj loĝos en apuda hotelo (sama prezo, simple une ĉeko)

Aliĝo : ĉefaliĝanto = 20 eŭroj, kunaliĝanto = 12 eŭroj
16j <...>25j = 12 eŭroj, <15j senpaga

Abono al *la Informilo* : 12 eŭroj



Pripensinde...

Prirabado de Eŭropo

Ne nur en entreprenoj kaj organizoj, sed ankaŭ en institucioj registaraj (Kanado), internaciaj aŭ eŭropaj, la varbado de personaro pli kaj pli ofte fariĝas per anoncoj postulantaj ke la kandidatoj estu denaskaj angleparolantoj: **"English mother tongue", "English native speaker", "English mother tongue or equivalent"**. Ĝi prefero al Anglo-Saksoj rilate al personoj, kiuj eĉ perfekte regas la anglan kiel fremdan lingvon, eĉ foje por decidpostenoj, estigas kreskantan malkvietiĝon kaj reagojn en ĉiam pli granda nombro.

Bone lokita por scii kio reale okazas, *S-ino Anna Maria Campogrande*, tradukistino funkciulino de la eŭropa Komisiono, malferme deklaras ke *"Eŭropo fariĝas celo de strategio de lingva kaj kultura ĉirkaŭado envojigita jam de jardekoj kun ekonomiaj kaj komercaj celoj en kiuj nenio estis neglektita"*.

En la pasinta majo, la prezidanto de **Universala Esperanto-Asocio**, *prof. Renato Corsetti*, sendis oficialan plendon ĉe la pacperanto *Jacob Söderman* kontraŭ la eŭropa Komisiono pro lingva diskriminacio.

Multlingva peticio kontraŭ lingva diskriminacio estis lanĉita en kaj ekster Eŭropo la 26-an de septembro, okaze de la eŭropa Tago de la Lingvoj sur la ttt-ejo <<http://www.lingvo.org/eo/petskribo>>.

Main basse sur l'Europe

Non seulement dans des entreprises et des organisations, mais aussi dans des institutions gouvernementales (Canada), internationales ou européennes, le recrutement de personnel parlant l'anglais se fait de plus en plus fréquemment par des annonces exigeant que les candidats soient des natifs anglophones : "English mother tongue", "English native speaker", "English mother tongue or equivalent". . . Cette préférence à des Anglo-Saxons par rapport à des personnes qui ont même une excellente maîtrise de l'anglais comme langue étrangère, parfois même pour des postes-clés, soulève une inquiétude grandissante et suscite des réactions toujours plus nombreuses.


Bien placée pour savoir ce qui se passe réellement, *Mme Anna Maria Campogrande*, traductrice fonctionnaire de la Commission Européenne, déclare ouvertement que *"l'Europe fait l'objet d'une stratégie d'encerclement linguistique et culturel mise en place, depuis des décennies, à des fins essentiellement économiques et commerciales, où rien n'a été négligé."* En mai dernier, le professeur *Renato Corsetti*, président de l'Association Universelle d'Espéranto (UEA), a pour sa part déposé une plainte officielle auprès du médiateur européen *Jacob Söderman* contre la Commission européenne pour discrimination linguistique.

Une pétition multilingue contre la discrimination linguistique a été lancée en Europe et hors de l'Europe le 26 septembre à l'occasion de la Journée européenne des Langues sur le site <<http://www.lingvo.org/eo/petskribo>>.

GAZETARA SERVO DE SAT-AMIKARO = SERVICE DE PRESSE DE SAT-AMIKARO

Lingva demando daŭre tabuo en la EU !...

Netraktado dum Eŭropa Konsilio




Antaŭ la renkontiĝo de la **Eŭropa Konsilio** en Kopenhago (12. -13. 12. 2002) dum la pasinta semajno estis prezentita raporto de la prezida ŝtato, nome Danio, pri la uzo de lingvoj en la kunsidoj de la Konsilio en la plilarĝiĝonta Unio depost 2004. La raporto proponas ke la EU-ŝtatoj trovi akordon pri la maniero kaj ankaŭ pri la buĝetado de la interpretado dum la kunsidoj de la Konsilio ĝis junio 2003

Kompromiso ne trovas akordon. Krom la ideo daŭrigi la ĝisnunan sistemon, ke ĉiu oficiala EU-lingvo estu uzebla kaj la kostoj de la interpretado estu kovrita de la EU-buĝeto, ekzistas t. n. "sveda" modelo, kiu antaŭvidas ankaŭ daŭre la eblecon paroli kaj aŭdi interpretadon en ĉiuj 'oficialaj' lingvoj. La diferenco kuŝas en la financado, ĉar la 'sveda' modelo diras, ke ĉiu ŝtato devas pagi por sia propra lingvo. Se ekzemple estona registaro volas, ke la estona lingvo estu interpretita dum konsiliaj kunsidoj, Estonio devas kovri la elspezojn ! *"Germanio fakte subtenas tiun 'svedan' modelon"*, diras ambasadoro *d-ro Wilhelm Schönfelder* de la daŭra germana reprezentado ĉe la Europa Unio, *"sed pluraj ŝtatoj ne konsentas kun tiu modelo."* La kialo fakte estas sufiĉe evidenta: Ŝtatoj kiel Francio aŭ Germanio havas sufiĉe da financa forto por pagi la kostojn de interpretado dum konsiliaj kunsidoj. Por malgrandaj ŝtatoj kaj por ekonomie malpli fortaj ŝtatoj tio fariĝas jam problemo kaj principa demando, ĉu la EU devas kovri kostojn de interpretado ĉe propraj instituciaj kunsidoj aŭ ne.

Plurlingva reĝimo pludaŭros *"Ni efektive je la fino tute ne diskutis pri tiu raporto prezentita de dana prezidanteco kaj sekve ankaŭ ne aperas iu rezolucio aŭ simile en la prezidentaj konkludoj (vd. <http://www.europa.eu.int/council/off/conclu/index.htm>)"*, malkaŝas *Schönfelder* dum prelego ĉe la Friedrich-Ebert-Stiftung Bruselo. *"La lingva demando estas daŭre tiom tikla afero, ke vi ĝin apenaŭ povas tuŝi. Nek nun en Kopenhago nek ĉi tie en Bruselo"*, diras la germana ambasadoro kaj konkludas, ke *"ni supozeble daŭrigos kun la plurlingva reĝimo ene de la EU"*.

Marko Naoki LINS



Le 25 juillet, dans un article sur la nouvelle voiture "Tekna", un journaliste de l'hebdomadaire allemand "Die Zeit"* (*Le Temps*), Marc Kayser, a ainsi fait de l'esprit sur l'espéranto: "Tekna? Même des hommes qui maîtrisent la langue artificielle espéranto en voie de disparition n'ont jamais entendu ce mot."

Les hommes qui maîtrisent effectivement l'espéranto savent que le mot "Techno" (musique) est déjà entré dans la langue sous la forme "Tekno" et que sa forme adjectivale est justement "tekna" (veuillez vous-même contrôler avec les mots-clés "tekno muziko esperanto" avec un moteur de recherches). Les langues ne permettent pas toutes d'exploiter leurs racines avec autant de productivité, de précision et de rigueur, aussi simplement, logiquement, systématiquement, régulièrement.

Ce n'est ni le français, ni l'anglais, ni l'allemand, ni l'espagnol que 42 savants de l'Académie Française des Sciences avaient qualifié de "chef d'oeuvre de logique de simplicité" en 1924, mais l'espéranto **, ce qu'a confirmé le professeur Umberto Eco, soixante-dix ans après, par les mots "c'est une langue construite avec intelligence et qui a une histoire très belle".

Une recherche sur Internet*** avec le mot clé "esperanto", par exemple avec "Google" qui existe aussi en espéranto <http://www.google.com/intl/eo>, éventuellement combiné avec un nom de personne, de lieu ou de thème, permet de découvrir l'étendue, la vigueur et la diversité du monde de l'espéranto.

Parmi les premiers linguistes les plus renommés dans le monde qui ont hautement apprécié la valeur de l'espéranto, après recherche et comparaison avec d'autres propositions d'alors, se trouvait l'Allemand Max Müller. Cependant, c'est aussi en Allemagne que naquit une langue éphémère qui est effectivement disparue depuis longtemps: le Volapük. Il lui manquait l'équilibre entre le naturel et l'artificiel.

Le "Veltparl", le "Weltdeutsch", le "Weltsprache" et autres projets similaires eurent même moins de succès. L'espéranto traduit bien le mot latin "artificialis" qui signifie "fait avec art", "fait dans les règles de l'art". Une information ou un commentaire qui ne prête pas attention aux faits est fait de manière ni artistique (künstlerich) ni adroite (kunstfertig) mais elle est cependant artificielle selon la définition péjorative du mot "künstlich". **L'honnêteté intellectuelle exige recherche et comparaison.**

Des informations récentes sur l'espéranto montrent la bonne santé de cette langue de 115 ans qui a vu disparaître l'un après l'autre ceux qui ont annoncé son agonie ou sa disparition, ou même ceux qui se sont efforcés de le faire disparaître: les régimes d'Hitler, Staline, Salazar, Ceaucescu et semblables. Il n'y a pas que les régimes tyranniques qui ont voulu enterrer l'espéranto. Après la Première Guerre mondiale, dans les années 1921-1923, durant la période où le gouvernement français avait décidé l'occupation de la Rhur, la riche région industrielle allemande, il s'efforça aussi de barrer la voie à l'espéranto à la Société des Nations, alors qu'en Allemagne, 172 instituteurs enseignaient l'espéranto à 7000 élèves dans 126 écoles. En 1922, le ministre français de l'Instruction publique Léon Bérard interdit l'utilisation des locaux scolaires pour l'enseignement de l'espéranto. En 1935, le ministre de l'éducation du 3ème Reich, Bernhard Rust, suivit cet exemple. Les peuples doivent savoir ceci: même récemment, des gouvernements (ou membres du gouvernement) français ont souvent joué un rôle méprisable dans l'Histoire de l'espéranto. Et cependant, la langue réussit à vaincre ce mur de silence et de honte.

La 25an de julio, en artikolo pri nova veturilo "Tekna", ĵurnalisto de la germana semajngazeto "Die Zeit" (*La Tempo*), Marc Kayser, jene spritis pri Esperanto

"Tekna? Eĉ homoj, kiuj regas la formo tantan lingvon Esperanton, neniam aŭdis tian vorton!"

La homoj, kiuj efektive regas Esperanton, scias ke la vorto "Techno" (muziko) jam nature eniris la lingvon sub la formo "Tekno", kaj ke ĝia adjektiva formo estas ĝuste "tekna" (bv mem kontroli per la ŝlosilvortoj "tekno muziko esperanto" per retserĉilo). Ne ĉiujlingvoj ebligas tiel produktive, precize kaj rigore ekspluati siajn radikojn, simple, logike, sisteme, regule.

Nek la francan, nek la anglan, nek la germanan, nek la hispanan 42 sciencistoj de la Franca Akademio de Sciencoj kvalifikis "majstroverkon de logikeco kaj simpleco", sed Esperanton **, kion konfirmis profesoro Umberto Eco sepdek jarojn poste per la vortoj... "ĝi estas lingvokonstruita kun inteligenteco kaj kiu havas tre belan historion".

Interreta serĉado per la vorto "esperanto", ekzemple per "Google", kiu ekzistas ankaŭ en Esperanto <http://www.google.com/intl/eo>, eventuale kombinita kun nomo de persono, de loko aŭ temo, ebligas malkovri la vastecon, vigecon kaj diversecon de la mondo de Esperanto.

Inter la unuaj tutmonde plej famaj lingvistoj, kiuj alte taksis la valoron de Esperanto, post honesta esploro kaj komparo kun aliaj tiamaj proponoj, troviĝis la Germano Max Müller.

Tamen ankaŭ en Germanionaskiĝis efemera lingvo, kiu efektive jam delonge formortis: Volapük. Mankis al ĝi ekvilibro inter natureco kaj artfariteco. Eĉ malpli sukcesaj estis "Veltparl", "Weltdeutsch", "Weltsprache" k.s.. Esperanto bone tradukas la latinan vorton "artificialis", kiu signifas arte farita, farita laŭ la reguloj de arto. Informo aŭ momento, kiu ne priatentas faktojn, estas farita laŭ maniero nek arta (künstlerich) nek lerta (kunstfertig) sed ĝi estas tamen artefarita laŭ la pejorativa difinodo la vorto "künstlich".

Intelektala honesteco postulas esploradon kaj komparon.

Freŝdataj informoj pri Esperanto montras la bonan sanstaton de tiu 115-jarulo, kiu vidis malaperi unu post la alia tiujn, kiuj anoncis ĝian agonion aŭ malaperon, aŭ eĉ tiujn, kiuj strebis al ĝia malapero: la reĝimoj de Hitler, Staline, Salazar, Ceaucescu, ks.. Ne nur tiranaj reĝimoj volis entombigi Esperanton. Post la Unua Mondmilito, en la jaroj 1921-1923, en periodo kiam la franca registaro decidis okupacii Ruron, la riĉan industriaran regionon de Germanio, ĝi ankaŭ strebis bari la vojon al Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj dum, en Germanio, 172 instruistoj instruis Esperanton al 7000 lernejoj en 126 lernejoj. Tion devas scii la popoloj: eĉ freŝdate, francaj registar(an)oj ofte ludis malestimindan rolon en la Historio de Esperanto. Kaj tamen la lingvo sukcesas venki tiun muron de silento kaj honto.

Pri ĝia bonfarto, malgraŭ mensmanipulado favore al la angla kaj misinformado, atestas i.a.:

= statistikoj pri reago al radio-elsendoj en Esperanto: <http://www.esperanto-sat.info> -- Komunikoj / Communiqués -- "Radiophonie: La petite langue qui monte / Radiofonio: la eta lingvo kiu supreniras",
= la eldono de 77 verkoj el la rusa literaturo ĉe la eldonejo "Sezonoj" <http://www.sezonoj.itgo.com/index.htm> (Kaliningrad, Rusio). Plej laste: "Blankaj noktoj", de Dostojevskij,



Sinjoro Ministro,



Sabaton la 29an de novembro 2002, dum la finalo de la tenisa *Davos-Pokalo*, en Parizo, tre ofte la franca televido montris Vin. Vi tiam estis sidanta apud Sinjoro Boris ELTSIN, eksprezidento de Rusio, eksurbestro de Moskvo sed ankaŭ granda tenisŝtato.

Kiel grandan plezuron ambaŭ Vi povis trovi per intersanĝo de viaj malsamaj spertoj ! Vi povis klarigi al li, kiamaniere iĝi plurfoje olimpika ĉampiono ; kiel en nia lando ni regas la sportojn ; eĉ montri, ke teniso kaj sabr-arto ambaŭ estas luktaj sportoj. Kompreneble li povis rakonti al Vi, kiamaniere Sovetio refariĝis Rusio ; kiel li agadis por gvidi tian grandegan transformadon sen kompatinda sangofluro...

Bedaŭrinde la lingvaj baroj ekzistas ! Ĉiufoje, kiam mi vidis Vin, Vi estis mutaj. Neniam mi vidis Vin babili unu al la alia, interparoli, eĉ ŝerci. Tamen, la solvo ekzistas : kelkaj monatoj da lernado de la lingvo Esperanto estus ebliginta al Vi tre facile komuniki reciproke...

La sekvantan dimanĉon, mi havis la ŝancon partopreni en tiu gravega sporta evento. La spektaklo estis tiel mirinda en la spektantaro kiel sur la tenisejo ! Mi ja estus preferinta, ke venku la franca teamo, sed fine, post multe da emocioj, la rusaj tenisistoj plene meritas sian venkon. Se tiu grava rezulto povos redoni iom da fiereco al tiu estiminda popolo, mi estus tute kontenta.

Sed al nia lando bedaŭrinde okazis ankaŭ alispeca malvenko, kiam tuj post la premiado, la buŝtradukisto tradukis *anglalingven* la paroladon de la rusa kapitano. La franca ĉef-ministro, kiu ankaŭ ĉeestis la eventon, povus rememorigi, ke nia gepatra lingvo ankoraŭ estis hegemonia lingvo komence de la 20a jarcento. Ĉiuj amikoj de *Francophonie* certe ŝatis tiun plian *Berezina-aĵo*...

Permesu, ke en tiu ĉi jarmomento, mi deziru al Vi kaj al la multnombraj sportistoj de nia lando, miajn plej varmajn bondezirojn pri sano, feliĉo kaj ankaŭ pri sukcesoj, pokaloj kaj medaloj en la venontaj sportaj renkontiĝoj de la jaro 2003.

Michel DECHY

Instruisto pri matematiko, teniso kaj Esperanto.

LETRE OUVERTE A MONSIEUR J.-F. LAMOUR, MINISTRE DES SPORTS

Monsieur le Ministre,

Le samedi 29 novembre 2002, pendant la finale de la Coupe Davis à Paris, la télévision française vous a très souvent montré. Vous étiez assis à côté de Monsieur Boris ELTSINE, ancien président de Russie, ancien maire de Moscou mais aussi grand amateur de tennis.

Quel immense plaisir vous pouviez trouver à échanger vos diverses expériences ! vous pouviez lui expliquer comment devenir plusieurs fois champion olympique, comment on dirige le sport dans notre pays et même démontrer que le tennis et le sabre sont tous les deux des sports duels. Bien entendu, il pouvait vous raconter comment l'Union Soviétique est redevenue la Russie, comment il a agi pour guider cette immense transformation sans malheureuse effusion de sang...

Malheureusement, les barrières linguistiques existent ! Toujours, quand nous vous apercevions, vous étiez muets. Jamais nous ne vous avons vus bavarder, discuter, voire plaisanter l'un l'autre. Pourtant, la solution existe : quelques mois d'apprentissage de la langue espéranto vous auraient permis de communiquer très facilement.


Le lendemain, j'ai eu la chance de participer à ce très important événement, le spectacle était aussi étonnant dans le public que sur le court ! Bien sûr, j'aurais préféré que l'équipe de France gagne, mais finalement, après beaucoup d'émotions, les joueurs russes méritaient tout à fait leur victoire. Si ce très important résultat peut redonner un peu de fierté à ce grand peuple, je serai entièrement satisfait.

Pour notre pays, malheureusement, une autre défaite survenait, lorsqu'à la remise de la coupe, l'interprète traduisit *en anglais* le discours du capitaine russe. Le Premier ministre français, qui assistait lui aussi à l'événement, pourrait se souvenir que notre chère langue natale était encore hégémonique au début du XXème siècle. Tous les amis de la francophonie ont dû apprécier cette nouvelle *Berezina*...

Permettez qu'en cette époque de l'année, je vous souhaite, ainsi qu'aux nombreux sportifs de notre pays, mes meilleurs vœux de santé, de bonheur, et aussi de réussites, de coupes et de médailles dans les rencontres sportives de l'année 2003


Michel DECHY

Professeur de mathématiques, de tennis et d'espéranto



KALEJDO SKOPD

Karaj geamikoj,



La celo de ĉi tiu mesaĝo estas memori vin pri la ekzisto kaj bona funkciado de servo de la Akademio de Esperanto.

Temas pri la tiel nomata *Konsultejo* de la Akademio. Se vi havas lingvan dubon, ne mem solvu ĝin. Antaŭ ol decidi pri la plej bona solvo por vi, demandu la Akademion per mesaĝo al la direktoro de la Konsultejo, **Stefan Maul**, smaul86150@aol.com. Akademianoj, kiuj kunlaboras kun la Konsultejo, rapide debatos la peton rete kaj vi rapide ricevos lòa respondon.

La servo estis uzata dum la pasintaj jaroj en ĉi tiu maniero ĉefe de esperantlingvaj ĵurnalistoj, kiuj troviĝis antaŭ la neceso nomi tre lastatempan aĵon aŭ aferon.

La servo, tamen, funkcias ankaŭ laŭ la tradicia maniero, per letero al

Stefan Maul Pferseer Str.15 DE-86150 Augsburg Germanujo

kaj en tiu kazo oni ricevos respondon per letero. Bonvolu utiligi la servojn de la Akademio de Esperanto.

Amike


Akademio de Esperanto

La estraro



Angulo de la interretoj

Omnipage Pro 12 Office ekkonas Esperanton...



La ne nur tekstekona softvaro **Omni Page Pro 12 Office** kapablas prilabori laŭ la varbanoncoj **114 lingvojn**, eĉ tiam, se estas pliaj sur unu paĝo.

Koncerna listo de la subtenataj lingvo troveblas sur

<http://www.scansoft.com/omnipage/languages.asp>.

ScanSoft varbas ankaŭ pri tio, ke ĝi kapablas transformi datumarojn en PDF-formato al (ekzemple en *Word*) prilaborebla teksto.

Kiel la PDF-konvertiloj estas haveblaj diverspreze (inter senpage el la reto kaj multekostaj kiel *Adobe* kaj *JAWS*), sed produktas ankaŭ diverskvalitajn rezultojn (inter neuzebla kaj taŭga por profesia laboro), ankaŭ la rekonvertiloj liveros supozeble diverskvalitajn datumarojn.

Laŭ la firmao *ScanSoft* estas PDF-datumaroj per ilia programo nur origine konverteblaj, se la uzitaj eksterordinaraj skriboj estas instalitaj sur la koncerna komputilo.

Ĉar inter esperantistoj cirkulas la plej diversaj skriboj, estas ja unu el la motivoj uzi PDF-formaton, ebligi la senĝenan legadon eĉ al ricevanto tute sen Esperanto-skriboj sur sia komputilo. Ekzemple per la konvertilo de *JAWS* eblas enkodigi tiucele la uzitajn skribojn.

Omnipage Pro 12 Office ne estas malmultekosta programo (almenaŭ 100 €), kiu ankaŭ pro siaj ceteraj kapabloj (prilabori tabelojn, samtempe pli ol unu paĝon de mafermita libro, voĉlegi la skanitan tekston, rekonverti al PDF, . . .) verŝajne indas tiun elspezon. Tamen, miraklojn faros ankaŭ ĉe tiu programo nur la postvenonta versio.

Se ankaŭ la varbado ne ĉiam troigas, oni povas tamen facile veni al la limoj de kapableco de ĝenerale tre bona programo. Certe dependas de la cirkonstancoj, kiamaniere ĝi traktas diverstipajn grafikajn objektojn en la PDF-datumaro. Tial mi tre ĝojus pri rakontoj de gesamideanoj, kiuj jam uzas tiun programon.

Peter Hauser,
ercmontara.ec@t-online.de



Ĉu vi komencas lerni esperanton? . . . Jen specifa reto por vi!

Tommy Dahl en Danio faris retan forumon por komencantoj. Ĝi troviĝas ĉe la adreso <http://www.egenserver.dk/phpBB2/>, kaj ĝi bonegas, kvankam estas ankoraŭ lingvaj eraretoj. Nepre pludirenda al ĉiuj komencantoj!



plua esperanto-kurso sur interreto



Mi havas la plezuron informi al vi, ke jam estas en **Interreto** la versio en **franca lingvo** de mia *Kurso de Esperanto*. Ĝi konsistas el 15 lecionoj kaj enhavas multajn demandojn, respondojn, dialogojn kaj esprimojn de la ĉiutaga vivo. De la 1^a ĝis la 8^a leciono la lernanto povas auskulti la prononcon de Esperanto, kaj ripeti la aŭskultadon plurajn fojojn. Ekde la 8^a leciono, oni instigas la lernanton komenci la internacian korespondadon. Tiucele, la lecionoj enhavas "*leterfragmentojn*". Estas ekzercoj, kiun la lernanto devas fari, kaj li/ŝi mem povas kontroli la korektajn respondojn, klakante sur la respektiva butono.

La lecionoj povas esti presitaj por studi ilin, kiam la lernanto deziras. Por kiuj havas dubojn aŭ bezonas klarigon, estas "instruista estraro", al kiu la lernantoj povas skribi.

La retadreso de la Eo-kurso estas: <http://www.institutoesperanto.com.ar>

Bonvolu akcepti miajn korajn salutojn.

D-ro Marcelo Casartelli



Nepre havinda...

Sub la titoloj "**Valeur pédagogique de l'étude de l'espéranto**" (pedagogia valoro de la Esperanto-studado) kaj "Universal language requirement / Nécessité d'une langue universelle" (neceseco de universala lingvo) du tekstoj estas instalitaj respektive en la sekcioj "*Dokumentoj / Documents*" kaj "In English / En la angla" de

<http://www.esperanto-sat.info>

Ambaŭ verkis *Bruce Arne Sherwood*, nun profesoro de fiziko en la Ŝtata (Provinca) Universitato de Norda Karolino, en Raleigh (Usono).

Kvankam ne novaj (ili aperis respektive en la franclingva suplementoj "*Objectif 87*" de "*SAT-Amikaro*" en 1983 kaj 1985), ilia enhavo tamen plue validas pro tio ke miaz gvidantoj kaj decidantoj plue baraktas en la lingva politiko.

Tiuj ambaŭ tekstoj estis tradukitaj fare de *J.P. Beau*, profesoro de la angla, iama lernanto en la supera porinstruista lernejo de la strato d'Ulm, en Parizo, bedaŭrinde malaperinta ĉi jare. Tio estas formo de omaĝo al fidela kaj brila membro de SAT-Amikaro.

Deux textes ont été installés sous les titres "**Valeur pédagogique de l'étude de l'espéranto**" et "Universal language requirement / Nécessité d'une langue universelle", respectivement en sections "*Dokumentoj / Documents*" et "In English/ En la angla" de <http://www.esperanto-sat.info>

Les deux ont été écrits par *Bruce Arne Sherwood*, actuellement professeur de physique à l'Université de Caroline du Nord, à Raleigh (États-Unis).

Bien que pas nouveaux (ils sont parus respectivement dans les suppléments en français "*Objectif 87*" de la revue "*SAT-Amikaro*" en 1983 et 1985), leur contenu reste toujours valide du fait que les dirigeants et décideurs continuent de patauger dans la politique linguistique.

Ces deux textes avaient été traduits de l'anglais par *J.P. Beau*, professeur d'anglais, ancien de l'École Normale Supérieure de la rue d'Ulm, malheureusement disparu cette année. C'est une forme d'hommage à un fidèle et brillant adhérent de SAT-Amikaro.

Henri MASSON





OSIEK-PREMIO 2002

En 2002 la OSIEK-anoj proponis 21 verkajojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de *La Gazeto*. La 26an de julio, dum la IEK en Leuven, Belgio, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Krešimir BARKOVIĆ

pro traduko de:


7000 Tagoj en Siberio de K. Štajner

Gratuloni!

La premio, 500 eŭr., rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkajo ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.

krokizo de Mэгumi Sachs-Komamura Informoj: *La Gazeto*, 55210 Creuű, Francio kaj <http://osiek.org>

Komuniko de "Vinilkosmo" Unua volumo de Brazila Kolekto! ... Tom JOBIM en Esperanto ...



La konataj muzikistoj *Flavio Fonseca* el Brazilo kaj la argentina *Alejandro Cossavella* kune produktis tiun altkvalitan KD-on "*Tom Jobim en Esperanto*".

Temas pri unua volumo de kolekto, kies venontaj volumoj enhavos kantojn de aliaj famaj brazilaj aŭtoroj.

Perloj kiel Unutona Sambo, Tristas, Knabino el Ipanema kaj aliaj estas kantataj de *Alejandro kaj Flavio*, krom speciala partopreno de la kantistino *Silvana* kaj de la bonega gitaristo *Marcelo*

Lafeta.

La tuta produktado okazis en **digitala sonsistemo**, en altnivela kaj plej freŝdata teknologio, kun orkestraj aranĝoj kaj specialaj partoprenoj de bonaj brazilaj instrumentistoj.

La elstarajn tradukojn verkis la svedo *Bertil Wennergren* (de la grupo *Persone*), la germano *Aaron Koenig* (de la bando *La Mondanoj*), la Brazilanoj *Jair Salles* kaj *Francisco Wechsler*, *Flavio Fonseca* kaj *Alejandro Cossavella* (de la bando *La Porkoj*).

Nepre nemalhavebla KD, por disvastigo de Esperanto, por bazaj kaj daŭrigaj kursoj, kaj, en ĉiuj momentoj, por ĉies ĝuo.

Ĝi jam troviĝas en la katalogo kaj TTTejo de *Vinilkosmo* sub referenco **VKKD 51**.

NOVA !!

Se vi volas mendi sen atendi, vi povas tion fari tuj klakante rekte, ĉu gluante, ĉu kopiante en la spaco '*url*' de via navigilo la ĉi sekvan ligan :

#<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkcd51#>

Se vi jam havas '*Vinilkosmo*' - pasvorton, vi povas rekte iri al la mendilo, sen bezoni redoni viajn personajn informojn, simple aldonante al la antaŭindikita ligo :&id=VIAN_PAS_VORTON (anstataŭigante VIAN_PAS_VORTON per via 'vera' pasvorto, kompreneble. . .) kiel ĉi sekve :

#http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkcd51&id#=VIAN_PAS_VORTON

Se vi ankoraŭ ne havas pasvorton, ĝi estos sendota al vi aŭtomate perrete, se vi uzas la unuan ligan, kaj eĉ se vi ne iras ĝis la fina pago.

Do ne hezitu, ĝi daŭre estos valida estonte, ĝi ŝparigos al vi tempon kaj evitigos al vi erarojn !

Konservu ĝin zorge, kaj ne hezitu ĝin uzi

2-a komuniko (junio 2002)

Jam ĵus alvenis "*SEN*" La senelektra albumo de *Persone* !

Jen ĵus aperis la 5-a albumo de *Persone* kaj la 4-a KD de la bando !

La fama esperanta rokbando havas de kelkaj jaroj ankaŭ alian vizaĝon, tute akustikan, kun du gitaroj, kontrabaso kaj bele interplektiĝanta harmonia kantado. Multaj kiuj ĝuis iliajn etosplenajn koncertojn (i. a. en UK en Montpeliero, KAFE en Tuluzo kaj pluraj KEF en Svedio, Danio kaj Finnlando) senpacience atendis diskon kun tiu repertuaro de la bando.

Finfine jen ĝi, transprenanta la etoson kaj intimecon de la koncertoj al via KD-ludilo! La disko enhavas naŭ novregistritajn kantaĵojn, kiel ekzemple la jam klasika "*Mi ĉiam kredis*", la mistika "*Perloj sur la tero*" kaj la svenigebela akustika transformiĝo de la iama elektra furoraĵo "*Revoj*". Aldone al la novregistritaj pecoj la KD finiĝas per du jam eldonitaj kantaĵoj kun plibonigita kaj remastrita sono.

Ekde nun vi povas mendi vian ekzempleron kiun vi tuj ricevos kontraŭ pago de 13 EŬR kun imposto (AVI) + 3,31 EŬR (sendokostoj nur por *Eŭropaj Uniaj landoj*). Por mendo en aliaj landoj ekster Eŭropa Unio, pliaj kvantoj aŭ libroservoj kontaktu nin (adreson vidu malsupre).

VINILKOSMO "Esperanto-Muzik-Prod"
2bis Chemin du Canal F-31450 DONNEVILLE
Tel : +33 (0)5 61 81 95 65
Faks : +33 (0)5 34 66 04 15
Reto : "Vinilkosmo" eurokka@club-internet.fr
Kompreneble, ankaŭ la diskoj disponeblas en nia TTTejo:
www.vinilkosmo.com

Informo de la TTTej- kunordiganto (Mark Eaton)

Bona novaĵo !



Nova brazila KoDisko alvenis... Jen "SIMBIOZO" !

Tiu albumo estas frukto de kunlaboro inter la konata brazila muzikisto FLAVIO FONSECA kaj la elstara poeto GERALDO MATTOS, prezidanto de *Akademio de Esperanto*.

Tiu ĉi disko prezentas bukedon de muzikstiloj kolorigitan de la sudamerika etoso kaj de kreema arta riĉeco.

El ĝi vi aŭdos karnavalan sambon, ŝoron, bosanovon, latinan jazon, noveraan muzikon kaj eĉ iun elektronikan ! Ĉiuj aranĝoj estis registritaj per **diĝita** sonsistemo, en **altnivela** kaj plej **freŝdata** teknologio. La belegan modernan kovrilon kreis *Elison Simas*, kun ĉiuj kantitaj tekstoj kaj aliaj informoj.

Pluraj invititaj muzikistoj partoprenis: *Jorge Cardoso*, unu el la plej konataj mandolinistoj en Brazilo; *Eugenio Matos*, pianisto kaj muzikestro; *Evandro Barcellos*, kavaketisto, kiu specialiĝis pri karnavala sambo; *Marcelo Lafeta*, spertega gitaristo, kiu partoprenis en du kantoj; *Gilza Maria*, kiu bele ludis tenoran bekfluton; kaj *Cristina Pancieri*, konata en Esperantio pro aliaj kunlaboroj kun *Flavio Fonseca*.

Nepre nemalhavebla KD! Ĝi plibriligas la esperantan kulturon, kaj vi povas uzi ĝin por disvastigo de Esperanto, en bazaj kaj daŭrigaj kursoj, kaj, ĉefe, por aŭdi, reaŭdi, re-reaŭdi ! . . .

Vinilkosmo distribuas ĝin pere de sia katalogo kaj TTTejo www.vinilkosmo.com en la rubriko 'Nova Referenco'.

= Novaĵoj pri ELEKTRONIKA KOMPILO:

La preparoj de la *Elektronika Kompilo*, estas jam en la fina fazo, kaj povus esti, ke ĝi disponeblos antaŭ la jarfino. Interesatoj jam povas rezervi ĝin sendante al ni mesaĝon, tiuj estos la unuaj avertitaj antaŭ la apero de la kompilo.

= Se vi volas mendi la diskon "Simbiozo" de Flavio Fonseca sen atendi, vi povas tion fari tuj klakante rekte, ĉu gluante, ĉu kopiante en la spaco 'url' de via navigilo la ĉi sekvan ligon:

#<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd52#>

Se vi jam havas 'Vinilkosmo' - pasvorton, vi povas rekte iri al la mendilo, sen bezoni redoni viajn personajn informojn, simple aldonante al la antaŭindikita ligo :

&id=VIAN_PAS_VORTON (anstataŭigante VIAN_PAS_VORTON per via 'vera' pasvorto, kompreneble. . .) kiel ĉi sekve:

#http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd52&id#=VIAN_PAS_VORTON

Se vi ankoraŭ ne havas pasvorton, ĝi estos sendota al vi aŭtomate perrete, se vi uzas la unuan ligon, kaj eĉ se vi ne iras ĝis la fina paĝo.

Do ne hezitu, ĝi daŭre estos valida estonte, ĝi ŝparigos al vi tempon kaj evitigos al vi erarojn !

Konservu ĝin zorge, kaj ne hezitu ĝin uzi.

Ni estas feliĉaj anonci al vi la transigon de *vinilkosmo.com* en novan servilon, kaj pro tio ankaŭ la grandan plibonigon de ĝia funkciado.

Tiuj kiuj konis malfacilaĵojn por konektiĝi aŭ troigan malrapidecon en la navigado, ekde nun ne plu devus renkonti tiujn problemojn ! Notindas ankaŭ la nova ebleco por pagi viajn mendojn pere de *Nacia Poŝt-Mandato* (por Francio) aŭ *Internacia Poŝt-Mandato*.

La pago pere de *kreditkarto* restas, tamen la plej rapida kaj simpla solvo. Tiam la mendoj estas tuj plenumitaj kaj senditaj senprokraste

Por fini ! Aliaj novaj diskoj kaj reeldonoj

Post la disko de *Morice Benin*, *In-Spir'* aperis ankaŭ unu interesa disko el Brazilo (krom tiu de *Tom Jobim*)

- *Verdastelaj Brazilaĵoj* de la kantisto *Tarcisio Lima* Ref. **VKKD 49**.

- En preparo : *Elektronika Kompilo* kun deko da artistoj kaj Dj-oj el pluraj landoj prezentante diversajn stilojn de elektronika muziko.

- Estis reeldonita por la 5a fojo la KD de *Jacques Yvart Kantas Georges Brassens en esperanto* ref. **VKKD 19**

- Reeldono (la dua) de *Sed estas ne de Persone* ref. **VKKD 20**.

- Reeldono (ankaŭ la dua) de *Meven de la Bretona Esperanto-Koruso* ref. **VKKD 43**.

- Reeldono (denove la dua) de *BroKantaĵoj de Esperanto Desperado* ref. **VKKD 34**

Plej muzikajn salutojn de *Floreal MARTORELL*, direktoro de "VINILKOSMO"



Ni memorigas, ke E-Redakcio de **Radio Polonia** disaŭdigas **ĉiutage** sian elsendon je la 13.30 h (laŭ la Universala Tempo) (41 m = 7275 kHz) kun la ripetoj je 18.00 h (42.07 m. = 7130 kHz), 19.00 h (nur satelite) kaj la sekvan tagon je 08.30 h nur per satelite. (Ripeto de la programo aŭdiĝinta la antaŭan tagon). Post la ripeto je la 8.30, la elsendo estas aŭdebla en ret-versio.

Por aŭskulti nin laŭ la mezeŭropa tempo necesas alkalkuli du horojn, ekzemple 13.30 + 2 h = 15.30. La satelita ricevo estas ebla per: Eutelsat II F - 6 - Hot Bird - 13 gradoj de la orienta latitudo; frekfenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz

La adreso por retaj aŭskultantoj: <http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>

Ni memorigas, ke multaj sonmaterialoj de la E-redakcio de Radio Polonia troviĝas ĉe la adreso de nia aŭstra aŭskultanto: **Anton Oberndorfer**: Lia retradio liveras jam de kelka tempo ankŭ felietonojn de nia redakcio pri la sociaj kaj socialaj temoj. Siajn servojn Anton Oberndorfer vastigis per dulingva versio de iuj felietonoj - esperanta kaj germana. Uzu kaj disvastigu esperantan ret-radion! <http://start.at/retradio>

Nia hejmpaĝo: http://www.radio.com.pl/polonia/esperanto_eo.asp Sur niaj paĝoj ni afiŝas ĉiutage la tekstojn de niaj informbultenoj. Kelkfoje - pro la aktualigo - ili ne plene identas kun la sonversio de la informbultenoj.

La rimarkojn pri la programoj E-Redakcio de RP atendas rete: esperanto.redakcio@radio.com.pl aŭ pietrzak@wa.onet.pl; poŝte: Pola Radio E-Redakcio, Al Niepodleglosci 77/85, 00-977 Varsovio, pk.46; telefone: (+48-22) 645-93-37, 645-93-58; fakse: (+48-22) 645-59-17

Jam de pli ol 40 jaroj esperantlingvaj elsendoj de **Pola Radio** kreas la ĉiutagan esperantan lingvomedion, de kelkaj lastaj jaroj tiu ĉi lingvomedio dank' al la interreto estas tutmonda!

Barbara Pietrzak *La estro de la E-Redakcio de PR*

Esperanto en la universitatoj


Ekde kvin jaroj oni instruas Esperanton ĉe la politekniko en **Lublin**; ĉi-semestre tie ĉirkaŭ 40 studentoj lernas la internacian lingvon.

Esperanto estas unu el kvar elekteblaj lingvoj apud la rusa, la germana kaj la franca - proksimume **30 procentoj** de la studentoj elektas ĝin. La Esperanto-studado en tiu supera teknika lernejo daŭras du semestrojn kun po 30 instruhoroj; instruisto estas *Tomasz Chmielik*. La Esperanto-instruadon enkondukis profesoro *Witold Stępniewski*, kiu nuntempe estas vicrektoro de la politekniko en Lublin.

Ankaŭ vi !... Ne pre vizitu la hejmpaĝon de UEA ! www.uea.org

Komuniko N-ro 162 (2002-12-16)

GRAVAJ ANONCOJ EN NACILINGVAJ GAZETOJ



Kunlige kun la pinto-konferenco de la *Konsilantaro de la Eŭropa Unio* en Kopenhago aperis tutpaĝa anonco pri la lingva egaleco kaj Esperanto en *European Voice* (13/12/2002). *European Voice* estas anglalingva gazeto multe legatata de politikistoj kaj ĵurnalistoj en Bruselo. La gazeto ankaŭ estas disdonita al ĉiuj partoprenantoj en la pinto-konferenco de la Konsilantaro de la Eŭropa Unio en Kopenhago.

En la sama tago aperis anonco en la dana en la kopenhaga gazeto *Politiken* kaj en la antaŭa tago en alia dana gazeto *Berlingske Tidende*. Ankaŭ ĉi tiuj anoncoj pli specife celantaj danajn politikistojn kaj la danan publikon parolas pri la lingva diskriminacio en Eŭropo kaj pri la neceso forigi ĝin.

La anoncoj estis eblaj pro la malavara subteno de japana esperantisto, *Etsuo Mijoŝi*, al UEA por tiu celo. Ĉar temis pri Eŭropo, la konkreta laboro por realigi la anoncojn estis farata de *Eŭropa Esperanto-Unio* kaj de la *Brusela Komunikad-Centro*.

Estas ankoraŭ tro frue por taksu la efikon de la anoncoj, sed certe temas pri klopodo **rekte alparoli politikistojn kaj publikon** pri lingva diskriminacio kaj pri Esperanto kiel justa solvo.



*Emfazu pri nia propra kulturo!
Inter diversaj rimedoj, montru al la skeptikuloj
la novan libron, kiun vi metis sur vian libro-breton!*

El nia libroservo

Informoj



⇒ La libroservo partoprenis la 52an staĝon en Villers lès-Nancy la 19an kaj 20an de oktobro. 66 libroj kaj kasedoj estis tie venditaj!

⇒ Ni rendevuas ĉiujn al la venonta regiona staĝo dum printempo en vogejoj!



Resumoj, recenzoj, opinioj...

⇒ Ĉiu leginto kiu deziras recenzi, preparoli, opinii pri legita libro povas sendi al mi (je la adreso de la libroservo) kelklinian tekston por ke ĝi aperu en tiu rubriko en venonta informilo.

Reeldono de

Ŝia lasta postkarto - Krimromano de Sergo Elgo - IEM - 15 €

Nekredeble ! Izabela ŝi nomiĝas kaj ege bela kaj juna ŝi estas ! Kaj supernormale inteligenta ! Ke ĉiujn sin ĉirkauantajn virojn ŝi ensorĉas, ja evidentas ! Ke okazas ĉe ili kapturigoj ankaŭ ne mirigas. Same evidentas, ke en tia krimromano policistoj serĉas krimulon ! Al unu ne mankas flarkapablo, fakte neatendita (!), des pli ke li estas nehaltigebla fumanto ! Krome li ankaŭ laboras per la matematika teorio de ensembloj ! Ĉu sukcese kun tia zuzulino ? La enigmon certe vi ne solvos, sed kelkajn agrablegajn horojn vi pasigos.

Leginda verko de la serio de IEM (Internacia Esperanto-Muzeo), sinonimo de ege plaĉaspektaj libroj. Krome la lingvospertaj legantoj miros kelkloke pri iuj vortoj kaj gramatika strukturo !

Por mendi librojn:



1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 7 place de PARIS 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan medilon)


- per e-poŝto al «libroservo@wanadoo.fr»

- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Germananoj povas pagi per germana poŝta ĝiro al la poŝta konto de TAKE (POSTBANK 3393 48-758 BLZ 660 100 75), indikante: «libroservo + numero de fakturo»



Nove alvenintaj libroj



Jus naskitoj:

- Cisko kaj Vinjo - bidstrio - 60p - **Vandersteen** - *Standaard Uitgeverij*... 7,00 € .
- Vojaĝo en esperanto-lando-instrulibro 280 p- **Boris Kolker**-18,00 €-perfekta kurso de esperanto kaj gvidlibro pri E kulturo
- Klara vortaro esperanto-araba - vortaro - 304 p **Abraham** - *U.E.A.* 13,50 € - necesas koni la araban skribarton!
- Kurso de esperanto en la araba - instrulibro - 2a eldono - 136 p **Abraham** - *U.E.A.* 6,90€ - sama rimarko kiel ĉi-supre
- Esperanta frazeologio -lingvo - 194 p **Sabine Fiedler** - *U.E.A.* 19,80 € analizo de la frazeologio en esperanto
- Pocket esperanto dictionary - vortaro - 410 p **Andrew Mac Linen** - *U.E.A.* 15,00 € - angla/E - E/angla 70.000 tradukoj
- Centra Oficejo de U.E.A. en vortoj - promenlibro - 48 p **Gbeglo Koffi** - *UEA* 4,80 € - malkovro de la Centra Oficejo
- Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj - diskutlibro - 62 p **Strubbel** - *U.E.A.* 7,50 € - 80 temoj diskutataj
- Vortaro esperanto-Suahila-vortaro-162 p-**Jan Knappert**-*U.E.A.* 7,50 € leksiko de esperanto al kaj el lingvo de orienta Afriko



Kolekto de libroj de André Cherpillod

- Zamenhof: datoj, faktoj, lokoj - biografio - 34 p - 4,50 €
- Aglutinaj lingvoj kaj esperanto (la) - lingvo - 26 p - 7,50 €
- Gaston Waringhien -biografio - 82 p - 8,70 €
- Vort/konsisto/farado/analizo/ordo - lingvo - 60 p 6,60 €
- Zamenhof kaj judismo - 64 p - 7,80 €
- Atlantido - historio - 62 p - 7,20 €
- De la edikto de Nanto ĝis la ribelo de la kamizardoj - historio - 44 p 5,40 €
- Dioj de Izraelo (la) - historio - 26 p - 3,60 €
- Gilles de Rais - historio - 46p - 5,40 €
- Historio de la ĉiferoj - historio - 30 p - 4,50 €
- Kaj la suno haltis - historio - 30 p - 8,25 €
- Katarismo kaj naskiĝo de Inkvizicio - historio - 38 p - 4,50 €
- Kaj la fiŝo fariĝis homo - naturscienco - 46 p - 5,40 €
- Akada leksikono - lingvo - 90 p - 9,00 €
- Galla lingvo (la) - lingvo - 110 p - 10,80 €
- Glozel kaj la prahistoria skribo - vortaro - 136 p - 13,50 €
- Mil ekzotaj vortoj - lingvo - 124 p - 3,00 €
- Zamenhofa radikfarado (la) - lingvo - 34 p - 4,50 €



MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

-
-
-
-
-


S-ro/ino

-
-
-
-

En

la

Subskribo:



Certe multaj el niaj spertaj esperantistoj laboris kun plezuro per la daŭre konsilinda verko de William AULD, "Paŝoj al plena posedo". Ne indas forgesigi la valorajn lingvo-ekzercojn de tiu utiliga lernolibro.

Sed aldoniĝas alia, samcela verko de Boris KOLKER, "VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO". Certe iuj jam konis la unuan eldonon (1992), sed nun UEA aperigis duan eldonon sur glacea papero, abunde ilustrita per amaso da fotoj. La lingvaj ekzercoj ŝajnas malpli interesaj ol en kursaro de William AULD, sed la tekstaro estas riĉenhava antologio de esperantlingvaj verkaĵoj kun sufiĉe detalaj biografiaj informoj pri la aŭtoroj.

Fakte kio estas prezentata kiel kursmaterialo por ĉiusemajna kurso de Esperanto estas ege agrabla promeno tra Esperantujo !. Eĉ longjara sperta esperantisto trovos en ĝi interesajn kulturajn informojn !

Nepre trastudinda supera kurslibro por tiuj, kiuj deziras ankoraŭ pli kompletan bildon de Esperantujo aŭ serĉi motivigon por posta legado de la verkoj, el kiuj estas elprenitaj la tekstoj.



MONDOJ

34 esperantaj rakontoj

rikolto 2001

Eldonejo KLEKS

213 paĝoj



La ideo venis de Georgo HANDZLIK, la kantanta eldonisto: krei bukedon da rakontaĵoj de diversnaciaj verkaĵoj esperantistaj . La ideo realiĝis kaj la verko aperis dum la UK en Zagrebo. Bedaŭrindas, ke la tempo premis por ties realigo, ĉar kelkafoje abundas la preseraroj.

Malgraŭ tio, jen la fenomeno Esperanto: tutmonda verkistaro kunigita en unusola volumo ! Certe, la kvalito de la rakontoj ne egalas tutlonge de la legado, sed vi konstatos, ke novaj talentoj ekaperas, dum jam konataj spertaj verkistoj ankaŭ ĉi-okaze ĝuigos vin per sia talento.







... Ni kunsalivu !...




Recepto de la ĝardenoj de Kokajne ***

=== karota kuko ===

Recepto :

-  Miksu kune la ovojn, la sukeron, la cinamon
-  Raspu la karotojn, la ŝelon de la citrono kaj aldonu ilin al la antaŭa miksaĵo. Aldonu la pritonditajn migdalojn.
-  Miksu kune la farunon kaj la bakpulvoron, kaj miksu kun la aliaj almiksaĵoj. Vi havas belan paston !
-  Antaŭvarmigu la bakujon je 180 gradoj



Ĝustumu malvarme aŭ iomete varma kun kukajkremo aŭ vanila kremo...

Bonan apetiton !

- Almiksaĵoj :
- 200 gramoj da karotoj
 - 200 gramoj da pritonditaj migdaloj
 - 50 gramoj da faruno
 - 100 gramoj da sukero
 - 4 ovoj
 - 2 kuleretoj da cinamo
 - 2 kuleretoj da bakpulvoro
 - la ŝelo de unu citrono

*** la ĝardenoj de Kokajne estas asocio, kie senlaboruloj retrovas laboron, sociajn rilatojn. Ili kreskigas diversajn legomojn sen kemiaj aldonaĵoj.

La Jada drako, dua parto.

Sur la glacipario aperis granda ruĝa drako. Li staris en la fortikaj akvokirloj de fandiĝanta lafrivero. La ruĝa drako ekparolis.

- Mia amiko, ĉu vi aŭdas tiun bruegon, kiu dolorigas miajn orelojn ?

La blua drako, efektive, povis aŭdi multege da bruoj kiujn li neniam aŭdis antaŭe en la kratero de la vulkano, kie loĝis lia amiko la ruĝdrako. Li aŭdis la frakason de grandega martelo, seriojn de eksplodoj kaj skrapojn de maŝinoj. La ruĝa drako reparolis :

- Mi ne povas ankoraŭ suferi tion. Mi eĉ ne aŭdas min kiam mi modlas miajn obsidianojn. (Tio estis, ni diras pasante, lia granda pasio: ekstrakti la vitran lafon kaj modli ĝin iom post iom per siaj manoj dum li varmigas ĝin per siaj flamoj ĝis fabriki belajn nigrajn glatajn kaj brilantajn stonojn).

Mi kredas ke mi supreniros surfacon kaj cindrigos ĉiujn homojn kiuj detruas tutajn montarojn por ekstrakti iom da minaĵo.

- Ne faru tion mia amiko ! ekkriis la blua drako. Vi rompos nian interkonsenton. Ni promesis. Rememoru, kiam kun ĉiuj drakoj de la mondo ni ĵuris ne plu koleriĝi. Rememoru kiel ni estis fieraj. Estis antaŭ longtempe, kaj deposte, neniu drako plu ekstermis iun ajn specion.

- Ni vidas kien tiu promeso kondukas nin hodiaŭ, respondis la ruĝa drako. Tiuj homoj ruinigas la mondon. Ili elrabas senhalte la riĉaĵojn kiujn la planedo pacience konstruis dum jarmilionoj. Kaj se ili nur atakus la rokojn, sed ili senhalte bruligas hidrokarbidojn do ili sanĝas la komponion de la atmosfero, kaj...

- Vi rimarkis ĝin ankaŭ, ekdiris la blua drako. Sed timege, mi rememoris pri nia lasta kolero. Estis antaŭ 65 jarmilionoj. En nia furiozo, ni detruis, ne nur la grandajn lacertojn kiuj terurigis la tuta planedo, sed ankaŭ milojn da aliaj animaloj, kiuj estis senkulpaj. Ni devas agi alimaniere. Eble ni povos eduki la homojn ?

- Estos vana, eĉ se ĉiuj drakoj kunlaboros, ni ne sukcesos transformi ilin. Ili estas pli malbonaj ol la teruraj lacertoj. Ili volas rekrei la mondon kiel ili volas. Aktuale, ili manipulas la genetikajn informojn. Ili fabrikas adaptitajn speciojn por siaj propraj profitoj. Se tio daŭros, se ili ne ĉesigos genetikajn manipulojn, iliaj kuracistoj senmortigos ilin. Ni devas detruigi tiujn pretendemulojn.

La blua drako pripensis kelkajn momentojn.

- Eble vi pravas, mia amiko. Ni devas decidi ion. Iru vidi la jadan drakon por ke li konsilu nin.

Sur la paroi de glace apparut un grand dragon rouge. Il se tenait debout dans les remous vigoureux d'une rivière de lave en fusion. Le dragon rouge commença à parler.

« Entends-tu mon ami, ce vacarme qui me casse les oreilles ? »

Le dragon bleu pouvait en effet entendre une multitude de bruits qu'il n'avait jamais entendu auparavant dans le cratère du volcan où logeait son ami le dragon rouge. Il entendait le fracas d'un gigantesque marteau, des explosions en série et des raclements sinistres de machines. Le dragon rouge reprit :

« Je n'en peux plus, je ne m'entends même plus façonner mes obsidiennes. (C'était là, soit dit en passant, sa grande passion : extraire la lave vitreuse et la modeler petit à petit de ses mains tout en la chauffant de ses flammes jusqu'à obtenir de belles pierres noires lisses et brillantes).

« Je crois que je vais remonter à la surface et réduire en cendres tous ces humains qui, pour extraire un peu de minerai, détruisent des montagnes entières... »

- Ne fais pas cela mon ami, s'écria le dragon bleu, tu briseras notre pacte. Nous avons promis. Rappelle-toi, quand, avec tous les dragons de la Terre nous avons fait le serment de ne plus céder à la colère. Souviens-toi comme nous étions fiers. C'était il y a longtemps, et depuis aucun dragon n'a plus exterminé une espèce entière.

- On voit où cette promesse nous mène aujourd'hui, répliqua le dragon rouge. Ces humains sont en train de ravager la Terre. Ils pillent sans retenue les richesses que la Terre a patiemment construites en des millions d'années. Et s'ils ne s'en prenaient qu'aux roches ! Mais à force de brûler des hydrocarbures ils changent aussi la composition de notre atmosphère, et...

- Tu l'as remarqué aussi, coupa le dragon bleu. Mes flocons ne sont plus comme avant. Maintenant ils sont toujours ... sales !

- Tu vois, il faut en finir...

- Je suis très inquiet, reprit le dragon bleu. Néanmoins, je me souviens avec effroi de notre dernière grande colère. C'était il y a 65 millions d'années. Dans notre furie, nous avons détruit non seulement les grands lézards qui terrorisaient toute la planète, mais aussi des milliers d'autres animaux qui n'y étaient pour rien. Il faut trouver autre chose. Peut-être pourrions-nous éduquer les humains ?

- Foutaise ! Même si on s'y mettait tous, on n'arriverait pas à les transformer. Ils sont pires que les terribles lézards. Ils veulent refaire le monde à leur image. De nos jours ils manipulent les gènes. Ils fabriquent des espèces adaptées à leurs seuls profits. Si cela continue, à force de bricoler le vivant, leurs médecins vont les rendre immortels. Il faut détruire ces prétentieux !... »

Le dragon bleu réfléchit quelques instants :

« Tu as peut-être raison ami. Il faut que nous nous décidions. Allons voir le dragon de jade pour qu'il nous conseille ».

verko de Emmanuel Desbrières, dankegon al Ginette Martin kiu helptradukis.

Alzbeta el Valois - Elizabeto



Filipo la II-a estis vidvo kaj el dua geedzeco eksedziĝinta. La tria edzino devis ĝuste alveni al Madrido. Post longaj pripensadoj, de ĉiuj vidpunktoj, finfine estis decidite. Elizabeto el Valois, filino de franca reĝo Henriko la II-a kaj de sprita, sed profundeco de la koro malbonkora kaj supera Katerino el Mediči, ĝis nun preskaŭ infano, devis fariĝi sekvantino de sanga Maria Angla. Origine estis destinite, ke Elizabeto el Valois fariĝos edzino de Don Carlos (filo de Filipo), sed la patro volis mem edziĝi al ŝi.

Nevolonte forlasis Elizabeto la Sejnon por foriri sur riverbordojn de Mauzanares. Ju pli proksimiĝadis al hispanaj landlimoj la belega veturilo akompanata de hispanaj kavaliroj, des pli pala estis la filino de Henriko la II-a kaj des pli grandan timon ŝi travivadis. Ĝuste ŝi antaŭsentis, ke ŝin atendas malvarma estonteco. Filipo la II-a estis por ŝi pli avo ol edzo. La juna reĝino ne rajtis paroli kun ia granda. Kun teruro ŝi aŭdis, ke unu hispana reĝino estis per ĉevalo mortigita en malserena kastela korto, ĉar neniu el la kortegaj kavaliroj rajtis tuŝi ŝian korpon por ŝin liberigi.

Neniam tiu-ĉi francino ricevis varmegan ĉokoladon, neniam varman manĝaĵon. La tasoj kaj pladoj devis pasi ekde la tria ĉambristino al la dua, ekde la dua al la unua kaj poste al la supera kortegestrino, ĝis ili atingis la reĝinon.

Male dum tutaj horoj Elizabeto surgenuis apud sia maljuna edzo en glacie malvarma preĝejo preĝis kaj pentofaris siajn pekojn neniam faritajn. S-ro Don Carlos ŝin vidis nur sporade dum grandegaj kortegaj festenoj. Sed ŝi rimarkis ion frenezan en liaj okuloj. Ili ambaŭ naskiĝis en j. 1545. Sed kiam ŝi vidis lian kadukan figuron, maldikajn sabrajn krurojn, lian malgrasegan vizaĝon, ŝi ne bedaŭris, ke li ne fariĝis ŝia edzo, sed ŝi nepre bedaŭris, ke ŝi edziĝis al lia patro.

La hispana aero kaj medio, en kiuj ŝi devis vivi, al Elizabeto el Valois ne prosperis. Ĉio estis tre malvarma, tre glacia. Kiel bildeto bela franca princino ŝi similis nur al ombro. Ŝi estis nur 23-jara kaj kiel ia matrono sidadis en ampleksa kastela parko, fikse rigardis antaŭ sin mem kaj revis pri la parko en Parizo, alloga vivo sur Sejno.

Elizabeto el Valois ja vivis, sed ĝis tiam ŝi ne sciis, ke ŝiaj pulmoj funkcias neĝuste, ke ŝin atendas la morto, kaj ke Filipo la II-a jam pensas pri ŝia sekvantino. Anna Rakouška (Aŭstria) devis fariĝi ŝia sekvantino! Do Elizabeto mortis kaj ŝia ĉerko estis lokita en vastan eskorialan kripton.

Sed Don Carlos en sia pavilono kun dense kradigitaj fenestroj sciis nenion pri morto de virino, kiu devis fariĝi lia fianĉino. Li mortis nur kelke da tagoj pli poste.

La du, Don Carlos kaj Elizabeto el Valois, mortis ambaŭ la saman jaron 1569 en aĝo de 24 jaroj.

El „Spirit“ tradukis Jana Cíhová

Enpensigo

Kio estas la mifito?
Ses literoj, kiuj terurigas
Ses literoj, kiuj frostigas.

Sub tiu ĉi devizo
el homoj fariĝas murdintoj.
Kvazaŭ ili havus nenion alian pli bonan
je laboro, ili fariĝas soldatoj pro mongajno de tiuj,
kiuj en sendanĝereco ripozas
kaj oferas fremdajn vivojn por sia avideco.
Sed ni - simplaj homoj - sufiĉe!
Ni volas vivi!
Ĉar la vivo estas tiom mallonga!



Pirarbo

En la ĝardeno staras pirarbo maljuna.
Majestajn branĉojn ĝi al la ĉielo levas.

M. Rysová
Tradukis Jací

Estas bela rigardo sur ĝin
printempe, kiam ĝi per verdo vestiĝas
ne multe kaj per la floraromo logas
abelojn sur regalejan tablon.

Aŭtune poste ĝi fieras
pri siaj frunktoj kaj en vintro
staras enpensige, kjel
trista, forlasita liro.

Al homo ĝi liajn antaŭtempajn
antaŭulojn rememorigas
kaj en mallongigo
eĉ la vivon homan tutan.



Nos cotisations 2003

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2002. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2003 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2003 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT.

1. Association Régionale ESPÉRANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** (n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse.
Ex. Abono Informilo + kotizo 2003 por 755)
- par chèque bancaire à l'ordre de **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY**, mais adressé à notre trésorier: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse.

Abonnement et cotisation pour les années:	2003	2004	2005
Abonnement simple à La INFORMILO adresse en France	12 €	12 €	12 €
adresse à l'étranger	16 €	16 €	16 €
Adhésion simple à l'Association Esperanto France-Est			
• Membre fédéral avec abonnement à <i>La INFORMILO</i>	17,50 €	17,70 €	18 €
• Membre fédéral sans abonnement à <i>La INFORMILO</i> , pour les autres membres de la famille par exemple.	5,50 €	5,70 €	6 €

2. Associations Nationale et Internationale (cotisations 2003)

Les cotisations à l'UFE et à l'UEA sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP:85535D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2002 de l'UFE. Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.

Par contre l'abonnement à **LA INFORMILO** est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.

Adhésion à l'Association Régionale et à l'U.F.E.	
• Membre actif non abonné (reçoit le bulletin d'information Okazas)	30 €
• Membre actif UFE complet avec la revue de l'UFE, <i>Le Monde de l'Espéranto</i> + Okazas	52 €
• Membre actif UFE conjoint	30 €
Adhésion à l'Association Régionale et à l'U.F.E. et à JEFO (moins de 30 ans au 1.10.2002)	
• Membre actif JEFO salarié (reçoit <i>JeunEspéranto info</i> et <i>Koncize</i>)	30 €
• Membre actif JEFO étudiant, chômeur, scolaire, appelé (reçoit <i>JeunEspéranto info</i> et <i>Koncize</i>)	15 €
• Membre actif JEFO+UFE (reçoit <i>JeunEspéranto info</i> , <i>koncize</i> et <i>Le Monde de l'Espéranto</i>)	52 €
• Membre actif JEFO +UFE étudiant, chômeur, scolaire (reçoit <i>idem</i>)	35 €
Adhésion à l'Association Universelle d'Espéranto (UEA)	
• Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	+ 8 €
• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	+ 20 €
• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	+ 50 €

IMPORTANT

- 1) Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale **ESPERANTO FRANCE-EST**, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association. Les nouveaux adhérents à l'UFE ou à l'UEA, recevront leur carte de membre directement de ces associations.
- 2) Les autres membres trouveront dans le bulletin *La Informilo*, qui suit l'enregistrement de leurs cotisations, les coupons de l'année 2003 ou même 2004, à coller sur les cartes de membre respectives. Les membres de l'UEA y trouveront également les coupons 2003 donnant droit au service des délégués mondiaux dont les adresses se trouvent dans l'annuaire de l'UEA.
- 3) Les membres de l'Enseignement, payant leur cotisation de l'UFE, sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au **GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (GEE)**.
- 4) Les jeunes de moins de 30 ans au 01.10.2002 (qui auront bien mentionné leur date de naissance), payant leur cotisation de JEFO recevront la revue *JeunEspéranto Info* (France) et *KONCIZE* (Europe). Ils auront droit de vote à l'AG de JEFO et des tarifs privilégiés aux rencontres de JEFO, au **Pasporta Servo** et des réductions sur **la JEFO'butik**. Les moins de 30 ans adhérent à l'UFE seront automatiquement membres de JEFO et bénéficieront donc des mêmes conditions.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2003 ĝis 2005

La numero 120 de **La Informilo**, kiun vi nun ricevis, estas la lasta de la abon-periodo 2002. Alvenis la momento renovigi vian jar-abonon por 2003. Bonvolu trovi ĉi-poste la novajn tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Se vi jam pagis vian abonon por 2003 tiam aperas sur la unua linio de via adres-etikedo la mencio "**2003 A**". Se ne, vi bonvolu tre baldaŭ pagi vian abonon kaj kotizon laŭ la ĉi-subaj tarifoj. Ni antaŭdankas vin pro via akurateco.

JAROJ:	2003	2004	2005
Abonoj por adresoj en Francio:	12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abonoj por adresoj ekster Francio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:	5,50 eŭroj	5,70 eŭroj	6 eŭroj

Vi povas pagi la koncernan sumon:

1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:

Esperanto France-Est poŝtĉekkonto 1997 72W NANCY

Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.

La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:

ekzemple: abono Informilo + kotizo 2003 por 225

2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY sendita al jena adreso:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, al Inter Ni, kotizo, disko, donaco al ktp

Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.

3. Per ĝiro al la jena poŝtbankkonto en Germanio (Karlsruhe):

Je la nomo de: TAKE, kont-numero: 3393 48-758 BLZ 660 100 75.


(se vi estas nova abonanto, menciu vian kompletan adreson sur la ĝirilo aŭ informu nin aparte).

La kasisto: André Grossmann

Subteno al Malagasa Esperanto-gazeto Inter NI

<i>Inter Ni</i>	Eblas samtempe pagi vian abonon por 2003 al la malagasa revuo <i>Inter Ni</i> laŭ la jenaj tarifoj.
Subtena abono	18 €
Simpla abono	14 €
Abono en nepagi-povaj landoj	10 €

INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO



Florigi per edukado.

Inter la ĉefaj atingoj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, la programo INTERKULTURO: la virtuala Lernejo « Tibor Sekelj » interligas mezlernejajn klasojn tra la mondo.

Via aliĝo / subteno al ILEI favoras ĝiajn realigojn kaj vi ricevos ĝian revuon IPR, kvarfoje po jaro.

Ni kune « florigu per edukado » en esperanta medio !

La franca ILEI-sekcio peras tiun aliĝon.


La kotizon de 14.50 € sendu al la kasisto, ĉeko je la nomo de GEE, CCP Toulouse 1018 02 W.

sendo al Armand HUBERT,

13 chemin de la Solitude – 57200 SARREGUEMINES.

NI PROVU ...

... RIDETI !



En tiu familio oni vere frandas diskonigi humuraĵojn plej parte konatajn... Por ŝpari tempon, estis decidite dediĉi numeron al ĉiu el ili... Tiamaniere sufiĉas al la rakontanto eldiri la taŭgan numeron !

Je la tago, dum kiu oni festas la komunian de la dekjara Johano, je la momento de la deserto, invitito laŭte anoncas... 42 !

Ĉiuj gastoj ekridas !... 54 ! diras la onklo... Ridseksplodon !... 18 ! gajas la avo... La ĉestantaro bruege ridaĉas !...

Tiumomente, Johano, kiu tute ne kapablas klarigi al si la misteron de tiuj nombroj stariĝas kaj ekkrias 31 !

Unu sekundon poste vangofrapas lin la patro : « Nekredeble, fiknabo ! Rakonti tian nedecaĵon hodiaŭ... Ĉu ci ne hontas ?... ».



« Mia filino malkvietigas nin, Doktoro... Ŝi ja strange kondutas ! Ĉi somere ni feritempis sur la marbordo kaj la tutan tagon ŝi ludis per etaj ŝovelilo kaj rastilo por konstrui sablo-kasteletojn... »

- Trankviliĝu, sinjorino ! Tiaj agoj aspektas al mi tute normalaj !
- Mi aprezas vian konsilon, Doktoro... Ŝia edzo kaj mi mem, ni komencis vere starigi al ni demandojn !... ».

Du viroj sidas en barko kaj fieras pri siaj kaptitaĵoj...

Antaŭ ol aliri la bordon de la lageto unu proponas :

« Morgaŭ ni revenu ĉi-tien ! Jen kretopeco... Krucumu je la barko-planko !... »

La alia pripensas kaj replikas :

« Tio ne efikos ! Imagu, ke oni lu-donu al ni alian barkon !... ».

Tute spirmanka supreniras iu oficisto la ŝtuparon al sia laborĉambro...

Ve, survoje li trafas sian ĉefon !

« Nu, bonvolu okulumi al via brakhorloĝo ! Kial vi tiom malfruas ? »

- Hum, sinjoro direktoro, mi petas senkulpigon... sed mia edzino atendas bebon...

- Bone, pardonu min... Ĉu hodiaŭ okazos la evento ?

- Hum... Fakte ne... Nur post naŭ monatoj ! ».

Paro vizitas pentraj-ekspozicion...

Subite la edzo mutas antaŭ pentraĵo, kiu prezentas sian edzinon... tute nudan !

« Sed... sed... temas ja pri ci !

Ĉu ci povus klarigi al mi, kiam ci pozis por tiu aĉulo ?... »

- Kvietiĝu, karulo mia... Mi neniam pozis !

Li tutcerte pentris laŭmemore ! »...



Virino subite vekiĝas noktmeze kaj vikle vangofrapas sian dormantan edzon...


« Sed... ĉu ci ne frenezas ? plendas la viro ? »

- Mi songis, ke ci tenere brakumis belan blondulinon !

- Nu, temas nur pri sonĝo !

Plie, pri cia propra !

- Jes, evidente... Sed kiam ci tiel kondutas en miaj sonĝoj, mi facile imagas, kiel ci kondutas en ciaj propraj !... ».



Iu kliento ŝajnas tute perdita en granda ĉiovendejo. Li alparolas vendistinon :

« Senkulpigon, fraŭlino, kie troviĝas ĉiuj necesajoj por fiŝkapti ? »

- Specifaj vestaĵoj ĉe la unua etaĝo, kanoj kaj akcesoraĵoj ĉe la dua... Por freŝaj fiŝoj, vidu en nia teretaĝo ! »

Malpacience atendas sian amatinon eskimo ekstere, ĉe la enirpordo de la iglo. Finfine li eltriras termometron el la poŝo de sia peltaĵo kaj grumbblas :

« Se ŝi ne estas tie je 20 gradoj sub nulo, mi rehejmiĝos !... ».

Iu Skoto ĉeestas nekutiman sporteventon.

Temas pri salto el ponto helpe de elasta kablo... Li vere ŝatus provi la aferon...

« Kiom kostas unu salto ?... »

- Dek pundojn...

- Dek pundojn ? Estas multe tro...

Ĉu malmultekostus, se mi uzus simplan ŝnuron ?... ».

Antaŭ konkurso cele elekton de « Miss Londono », grupo da kandidatinoj veturas al la ĉefurbo per duetaĝa buso...

Survoje ekscitiĝas, kantas kaj ĝoje petolas la malsupre sidantaj junulinoj, dume profunda silento regas ĉe la etaĝo.

Scivoleme unu el la petolaj blondulinoj suprengrimpas la ŝtuparon...

« Kio okazas ? Ĉu vi jam stresigas ?... »

Ĉu vi ne aidas nin malsupre ?

- Jes... Sed vi, stiranton vi havas !... ».



Du virinoj babilas ĉe bushaltejo.

« Mia edzo kaj mi, ni tre feliĉis dum dudek jaroj... Kaj ni renkontiĝis !... ».

DISTRA ANGULO



jarfina konkurso



La solvojn de la du enigmoj vi sendu al la redaktejo ĝis la 31a de januaro. Post loto inter la sendintoj, la feliĉul(in)o povos elekti libron inter 5 libroj proponitaj.

En karcero. Iu "gasto" legas leteron senditan de la edzino...
Najbaro scivole pridemandas :
"Kion ŝi diras ?"
- ... Ke ŝi redonas al mi mian liberecon !"

"Silab" - enigmo ===== ☆

Helpe de la vort-elementoj ĉi-sube alfabete ordigitaj, malkovru vortojn, kies difinoj kuŝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, eldonos proverbon de Zamenhof


ab as ba co da duk ek en eo fo go id in is lim lo mo naj ni no no op os ra ra raj re ren ro sta ti ti to to tr tri tro uk umo ur zi

1	+ - - + - -	malgaja
2	+ - - + -	salajro por emerito
3	+ - - + -	simbolo de beleco
4	+ - - + - - -	ĉefurbo Kievo
5	+ - - + -	metala pinta stangeto
6	+ - - + - - - -	ellabori urbon
7	+ - - + - - -	alta, fortigigita loko
8	+ - - + - - -	racie malgrandigi
9	+ - - + - -	ero de komputilo
10	+ - - + -	sangolikvo
11	+ - - +	malmola korpoorgano
12	+ - - + - -	unua parto de menuo
13	+ - - + - -	detala, klariga noto
14	+ - - + - - -	ruza agado
15	+ - - + - -	moderna detektilo
16	+ - - + - -	profunda loko en montaro

Tiu virino plendas ĉe ĝardenbutiko...
"La sterkaĵo por verdaj plantoj, kiun mi aĉetis antaŭ kelkaj monatoj estas vere tro potenca !"
- Nekredeble, replikas la vendisto.. Neniam oni tion riproĉis al mi !
- Nu, imagu, ke mia edzo, kiu iun nokton ellitiĝis por elpreni sian medikamenton, eraris kaj englutis la likvaĵon !...
- Ĉu li iĝis grave malsana ?
- Ne temas pri tio... Sed mi ĵus eksciis, ke mi atendas triĝemelojn !"

Mistera krado ===== ☆

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18
C	E	A	B	I	M	I	E	I	N	A	C	D	F	A	Ĉ	A	I
O	L	R	R	O	M	J	E	L	O	E	E	E	M	A	I	K	O
	N	U	R		T	M	E		P	I	S	M	S	I	R	Ŝ	P
	R		Ŭ		N	L		T			U	U	Z	S			S



Transigu la alfabete ordigitajn (en la adekvata kolumno) literojn, de la supra krado al la malsupra. Vi malkovros faman aserton de Ejnstejn.

Solvoj (La Informilo 119)

1/ silab-enigmo : bonaj ekzemploj pli forte influas ol admonoĵoj
2/ mistera krado : oni devus daŭre esti amanta. Tial oni neniam devus edz(in)ĝi